

1979 aprilo

72-a jaro

n-ro 880 (4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Kongresi supre en Svislando

Vi trovos

iom da svisaj montoj en ĉi tiu numero. Tri ampleksaj kontribuoj klopodas bildigi la kongresan landon de 1979: d-ro Arthur Baur portretas Svislandon ĝenerale (p. 66–70), d-ro Tazio Carlevaro prezentas la ĉefan movadan eventon tie (p. 70–71), dum s-ino Julie Tonkin petole vagas tra la svisa montaro kaj babilas kun la famuloj de la montgrimpa historio (p. 72–74). Per sia tria sinsekva kongreslanda elfosaĵo Julie ankaŭ ĉi-foje provas elĉeti la "pek-ojn" de sia edzo Humphrey, kiu restas kondamnita je traktado de statutaj temoj. Nu, ĉio ĉi kune faras la familian saldon Tonkin pozitiva en ĉi tiu numero. Pretere dirite, Svislando kaj la Statuto havas amason da komunaj trajtoj. Ne estas nur tiel, ke pli-malpli ĉiuj ĝisnunaj statutoj de UEA luliĝis en Svislando, sed jen ankaŭ la nova statuto tre verŝajne koncipiĝos tie. Se la neŭtraleco estas la simbolo de Svislando, ĝi ne estas malplie la ĉeftemo de la movadaj diskutoj pri la statuto. Svisoj diskutas sian neŭtralecon trankvile. Kun kelkaj neglektindaj esceptoj, ankaŭ UEA ĉi-foje traktas sian statutan neŭtralecon en sviseskaj trankvilo, sobro kaj firmeco. Fine, se vi diligente studos la ĉi-numerajn statutaĵojn, ni ne regalos vin per ili denove en la maja numero. Promesite!

Enhavo

- 61 Statutaj ŝanĝoj / Raporto de la Komisiono: Vigla interŝanĝo de opinioj (Jürgen Hamann / Bolesław Staszczak)
En Moskvo fondita Asocio de Sovetaj Esperantistoj
- 63 Serĉataj agantoj en sporta medio
- 64 Kelkaj ĝeneralaj konsideroj pri la Statuto (Humphrey Tonkin)
- 65 Andreo Cseh 1895-1979
- 66 Ĉi-jara kongreslando: Potenco de komuna historio (Arthur Baur)
Esperanto en la Eŭropa Parlamento: Oficiala reago (W.J.C. v. Miltenburg)
- 70 Ekspozicio "Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando": Provo krei modelan ekspozicion (Tazio Carlevaro)
- 72 La iama Svislando: Tschingel kaj aliaj famaj alpistoj (Julie Tonkin)
- 75 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 76 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 78 Nekrologoj (Nid Dutra d' Amorim, S. Olivan Hernando, F. Faulhaber)
Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Anoncoj
- 79 Ekzameno E (Bernard Golden); Anoncoj
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

La telfero portas nin en sia pendgondolo – iom arbitre numerita por nia okazo – supren al Titlis, je 3 020 metroj super la marnivelo. La 64a Universala Kongreso de Esperanto okazos ankaŭ tie supre en Svislando, ne ĝuste sur Titlis, sed en Lucerno, ĉe lago, inter montoj. Ĉio en Svislando situas inter montoj, kiuj estas la ĉefa riĉaĵo de ĉi tiu unika lando. Sur la areo de iom pli ol kvardek mil kvadrataj kilometroj, ĉ. ses kaj duona milionoj da svisoj ĝuas abundon da montoj kaj akvo. Mankas tie naturaj riĉaĵoj, abundas lingvoj kaj gentoj, foras la maro por komerci kaj negoci, abundas ŝajne diligento por kompensi ĉiujn ĉi mankojn. Laŭ la ĵus publikigita superrigardo de la Monda Banko, la svisa nacia produkto, kun 9 960 dolaroj je loĝanto, superas tiujn de Svedio (9 250) kaj Usono (8 640), kaj postrestas nur la artefaritan riĉon de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj (14 420), Kuvajto (12 700) kaj Kataro (11 670). Por multaj landoj la Universalaj Kongresoj estas turisma evento. En la svisa turisma oceano (32,3 milionoj da turismaj tranoktoj en 1975) ni estos nur plia guto, ĝuanta tamen, la tutan profesion atenton de la klasika lando de turismo. Tiel la detalaj preparlaboroj, kiel la aliĝnombro, jam nun aŭguras sukceson por la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,– gld). Unuopa ekz. 3,– gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kosta duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo, eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) 259 8821.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milanówek, Pollando; telefono (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

Vigla interŝanĝo de opinioj

En nia decembra numero ni aperigis ampleksan prezenton de projekto por renovigo de la Statuto de UEA, kiun ellaboradis tuta aro da funkciuloj de la Asocio tra kelkaj jaroj. Ni invitis niajn legantojn sendi siajn komentojn al la Komisiono pri Statuto, kaj promesis, ke resumo aperos en la revuo. Du anoj de la Komisiono, s-roj J. Hamann kaj B. Staszczak, pretigis la ĉi-suban resumon, kiun ni aperigas en konciza formo. La tria komisionano, d-ro H. Tonkin, aldonis kelkajn ĝeneralajn rimarkojn.

Dum la pasintaj kelkaj monatoj, la Komisiono kolektis opiniojn de juristoj pri kelkaj teknikaj aspektoj de la statuto kaj notis diversajn teknikajn mankojn en detaloj de la proponitaj ŝanĝoj (interalie dank'al saĝaj intervenoj de niaj legantoj). Tiujn malgrandajn teknikajn punktojn la resumo ne tuŝas. Ĝi limiĝas al la ĉefaj trajtoj de la diskuto. Kelkaj punktoj levitaj de korespondantoj ne estis unuavice statutaj demandoj, sed ideoj taŭgaj por la Ĝenerala Regularo aŭ demandoj pri la agado de la Asocio. Plejparte la resumo ne aludas tiujn iom eksterkadrarn demandojn, kvankam ili estis zorge notitaj. Ne eblas menci ĉiujn korespondantojn en la resumo. Se via nomo ne aperas en la teksto, tio neniel signifas, ke la Komisiono ne donis al viaj proponoj zorgan atenton.

La Komisiono bonvenigas pliajn reagojn al la proponitaj ŝanĝoj kaj al la nuna raporto. Ĝi pludonos viajn komentojn resume al la Komitato antaŭ ties kunsidoj en Lucerno. Sendu viajn leterojn plej malfrue ĝis la fino de majo, prefere en kvar ekzempleroj, al la adreso de la Asocio en Roterdamo.

REZULTE DE LA ALVOKO, atingis la Komisionon ĝis la dato de tiu ĉi raporto 47 kontribuaĵoj, kelkaj eĉ plurpaĝaj. Ni rigardis kiel nian taskon nur kolekti kaj resumi la komentariojn, kvankam kelkloke ni mem esprimis niajn opiniojn kiel diskutantoj.

La ĝenerala opinio pri la projekto estas aproba. Eĉ nia eksprezidanto prof. Lapenna, forta kritikanto de la nuna laboro de UEA, asertis, ke "en la projekto troviĝas 1-2 utilaj eroj", sed li ankaŭ atentigas pri "tre multaj kaj principaj kaj teknike-juraj malutilaj, eĉ danĝere malutilaj klaŭzoj". Kontraste al prof.

Lapenna, s-ro Moritz juĝas la projekton "multe tro konservema". El tio rezultas, ke la projekto, laŭ s-ro Fighiera, "troviĝas sur bona vojo".

Ni transsaltas kelkajn teknikajn atentigojn pri la unua artikolo kaj venas al art. 3, **Celoj**. Ĉe a) s-ro Jossinet proponas aldonon "disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto", s-ro Majchert proponas aldoni post 'Esperanto' la vortojn "kontinuiganta pasintan internacian lingvon latinan". Ĉe b) unu leganto (s-ro Beckers) opinias la nocion 'spiritaj rilatoj' malklara, s-ro Moritz rekomendas skribi 'nacio' anstataŭ

'nacieco', kaj s-ro A. Sekelj opinias la mencion pri 'sekso' superflua, "ĉar ĉe esperantistoj neniam aperis tiu problemo". S-ro Briscoe proponas anstataŭigon de 'sen diferenco' per 'malgraŭ diferencoj'. S-ro Veen proponas diferencigon inter 'etna lingvo' kaj 'norm-lingvo' kaj proponas aldonan punkton: "Pristudi kaj informi pri manieroj kiel popularigi la Internacian Lingvon kaj kiel kreskigi la nombron de ĝiaj parolantoj/uzantoj".

S-ro Zanelli proponas, ke en la artikolo pri **Rimedo** necesas aldoni post "Esperanto-asocioj" la vortojn "impulso al la publika instruado de la lingvo". S-ro Majchert sugestas aldoni post "aliaj eldonaĵoj": "disvolvo de kulturaj aranĝoj". S-ro Veen proponas aldoni "konsiloj pri efikaj manieroj varbi novajn esperantistojn" kaj s-ro Andreev rekomendas, ke oni eksplicite menci inter rimedoj la okazigon, kun helpo de UN kaj Unesko, de "konferencoj, kiuj koncernu la parlamentojn de la ŝtatoj, la ministrojn de la klerco kaj edukado" ktp.

Kiam temas pri la **Neŭtraleco** de la Asocio, s-ro Jossinet rekomendas forstreki la frazoparton "kiuj ne estas lingvaj problemoj", ĉar — laŭ li — UEA havas nek juran kapablon nek kompetentecon proponi solvojn pri la dulingva problemo en Belgio ktp., ne rompante sian politikan neŭtralecon. S-ro Rasmussen kontraste rekomendas, ke UEA restu neŭtrala ne nur pri lingvaj, sed ankaŭ pri sociaj problemoj. Profesoro Waringhien atentigas, ke rigardi la "respekton de la homaj rajtoj esenca kondiĉo" jam signifas "preni starpunkton pri sociaj kaj politikaj problemoj". Li

En Moskvo fondita Asocio de Sovetaj Esperantistoj

EVENTO atendata jam plurajn jardekojn okazis la 14an de marto 1979 en Moskvo. En ĉeesto de cento da delegitoj kaj multaj gastoj, tiun tagon en la soveta ĉefurbo fondiĝis Asocio de Sovetaj Esperantistoj. Ni ne havas ankoraŭ multajn informojn pri la fondkunveno. Tamen, ni jam eksciis, ke d-ro Mahomet Isaev, eminenta lingvisto kaj esperantologo, fariĝis la unua prezidanto de la nova organizaĵo. Inter la gvidantoj de la Asocio troviĝas pluraj bone konataj Esperanto-aktivuloj en Soveta Unio, i.a. Boris Kolker, Aleksandro Koroleviĉ, Dmit Perevalov kaj Vladimir Samodaj. Pliajn detalojn pri nova organizaĵo vi trovos, espereble, en la maja

proponas jenan formulon: "UEA estas neŭtrala, kio signifas, ke principe ĝi rifuzas favori iun ajn ŝtaton aŭ ŝtatblokon kontraŭ alia; sed la ĉi-supre difinitaj celoj postulas, ke ĝi aktive laboru por la plibonigo de la internaciaj rilatoj kaj por la respekto de la homaj rajtoj".

Argumentante, ke en multaj landoj (ekz. Francio) Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ne estas leĝe oficialigita, kaj ke en la praktiko 'esenca kondiĉo' povus signifi 'interveno, se necesa, kiel ĝendarmo', s-ro Jossinet proponas pli mildan vortumon: "UEA rekonas kiel moralan referencon Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj sentas la bezonon de bonaj internaciaj rilatoj". S-ro Veen deziras substreki, ke esenca kondiĉo por la laboro de UEA estas "etosoj de toleremo inter diversaj vivkonceptoj kaj doktrinoj". S-ro Fighiera opinias, ke "la distingo inter internacia neŭtraleco kaj nacia libera sinteno finas epokon de fikcio", sed trovas la esprimon "bonaj internaciaj rilatoj" iom nebula.

D-ro Verloren van Themaat proponas aldoni, el la nun valida statuto, ke UEA "rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur nepolitika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio". S-ro Zlata proponas tute novan formulon: "UEA estas tutmonde neŭtrala organizo de esperantistoj. Tio signifas, ke ĝi ne aliĝas al iuj politikaj doktrinoj, partioj, ŝtatoj, grupoj de ŝtatoj, religioj, ideologioj. Ĝi respektas la personajn opiniojn kaj sentojn de siaj anoj. Aplikante striktan neŭtralecon ĝi kunordigas iliajn agadojn en amika, tolerema agordo por la disvastigo de Esperanto kaj ĝia humanisma ideologio...".

S-roj Moritz kaj Lo Jacomo opinias, ke en art. 6, **Lingvo**, la frazero "ĝenerala ĝusta lingvouzo" ne havas multan signifon, ĉar "neniu difinas, kio estas ĝusta". Kvar opiniantoj, inter ili prof. Waringhien, kritikas la nemencion de la Akademio de Esperanto (kiu, cetere, ankaŭ ne estas menciita en la nuna formo de la statuto). S-ro Pendlebury deziras agnoski 'evoluaĵojn' en la lingvo, do lasi lokon por eksperimentaj formoj.

Pri **Daŭro de Oficoj** d-ro W. de Smet atentigas, ke la nocio 'ofico' estas neklara, ĉar dubindas, ĉu delegiteco aŭ komisionaneco ankaŭ estas oficoj. S-ro Sekelj deziras limigi la oficaŭron por ĉiuj oficoj al du sinsekvaj periodoj. Post tiu tempo la oficohavantoj "dum almenaŭ unu deĵorperiodo ne rajtas esti en la sama ofico". Ankaŭ d-ro de Smet favoras limigon.

Prof. Lapenna atentigas, ke forigo de la klaŭzo, ke la Asocio ne respondecas finance pri la funkciado de la servoj, estas danĝera.

Ĉe **Membrokategorioj** pluraj homoj notis forigon de la mencio de la Honora Patrona Komitato, kiun la malnetintoj intencas trakti pere de aparta regularo. Tamen, ĝi menciigas en art. 28, evidente erare. S-ro Lo Jacomo atentigas, ke en art. 12, **Akcepto de ... Membroj**, mankas minimuma aĝo por aliĝintoj, voĉdonantoj kaj kandidatoj je oficoj. Li aludas speciale neplenaĝajn membrojn de TEJO. S-roj Hamann kaj

Staszczak proponas aldoni apartan paragrafon pri la rajtoj kaj devoj de la Membroj, laŭ kiu "ĉiu membro rajtas: partopreni en la alprenado de decidoj en UEA, rekte aŭ pere de siaj reprezentantoj aŭ en ĝenerala voĉdonado; esprimi sian opinion pri la problemoj koncernantaj la agadon de UEA, ties internan ordon aŭ la problemojn ligitajn al la laboro de UEA; kandidatiĝi je ĉiuj oficoj...; plendi respektive apelacii al la koncernaj instancoj; profiti la publikajn aranĝojn kaj servojn, kaj porti la insignon de UEA". Aliflanke, "ĉiu membro devas: obei la statuton de UEA, la regularojn kaj la decidojn de la gvidaj organoj; kontribui al la realigo de la celoj de UEA kaj akurate pagi la membrokotizon".

Pri la **Aliĝkondiĉoj** de la landaj asocioj, s-ro Rasmussen proponas konservi la nun validan tekston koncerne la neŭtralecon. S-ro Fighiera kritikas la esprimon "vaste malfermita al la civitanoj de sia lando" pro ĝia nebul-



Japanaj esperantistoj: UEA-statuto pretendas difini kiel ili organiziĝu antaŭ ol konkursi pri aliĝo al la Asocio.

eco. S-ino Pogorelaja proponas forstreki la parton, kiu komenciĝas per "precipe", ĉar — laŭ ŝi — tio povus signifi, ke eblas foje respekti la celojn kaj la neŭtralecon, alian fojon ne.

Kiam temas pri aliĝkondiĉoj de fakaj asocioj, s-ro de Smet ĝenerale rekomendas, serioze reprimensi la aferon de aliĝintaj fakaj asocioj: "Laŭ mi tio estas ne-logikaĵo, kiu fontas el la periodo, kiam UEA serĉis ĉiajn monrimedojn... Laŭ mi, aŭ ĉiuj fak-asocioj devus esti kunlaborantaj, aŭ UEA devus fari ion specialan por tiuj, kiuj estas en speciala statutkondiĉo — ekzemple registrado de la kotizoj kaj disponigo de oficisto por parta laboro".

Prof. Støp-Bowitz atentigas, koncerne **Kunlaboron kun Aliaj Asocioj**, ke eble formiĝos regionaj (plurlandaj) Esperanto-federacioj, ekz. okcidenteŭropa ktp., kaj proponas ekzameni la demandon, ĉu utilas enmeti ilin en la statuton. S-ro Rasmussen opinias, ke nepre eniru formulo, laŭ kiu la kontraktoj konformu al la neŭtraleco de la Asocio.

Pri **Eksiĝo kaj Eksigo**, aldone al kelkaj redaktaj ŝanĝoj, oni proponas fikson de limdato de la kotizpago (s-ro Sekelj) kaj aldonon, post "evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA", de la vortoj "morale aŭ

materie damaĝas ĝin", kiel aldonan kialon de eksigo (s-ro Hamann). S-ro Sekelj proponas por la lasta frazo "... rajtas plendi al la Komitato". S-ro Hamann proponas aldoni: "Eksigito rajtas, post dujara nemembreco, denove peti pri membriĝo, pri kio la Komitato decidas."

S-ro Moritz trovas la frazon "por reprezenti la Asocion en la diversaj landoj ..." (ĉe **Ĉefdelegitoj kaj Perantoj**) tro ĝenerala kaj danĝera. Li opinias, ke ĉefdelegito devas maksimume rajti reprezenti la Asocion inter la individuaj membroj. S-ro Texier opinias, ke oni nomu en la teksto minimume la unuan devon de la **Delegitoj**, nome varbadon de membroj.

Ni venas nun al la sekcio pri **Komitato**, ĉe kiu kontribuiĝis multaj komentoj. S-ro V.M. da Silva eĥas la ĝeneralan opinion kiam li asertas, ke la ŝanĝoj proponitaj en art. 21 estas pozitivaj, ĉar tio kontribuos al la kresko de la nombro de individuaj membroj kaj plidemokratiigos la Esperanto-movadon. S-ro Moritz demandas, kial oni ne permesu ŝanĝigon de la nombro de komitatanoj A dum la oficperiodo, ĉar ĝi respegulu la faktojn laŭeble aktuale kaj ne tiujn de antaŭ unu, du aŭ eĉ tri jaroj. S-ro Sekelj proponas enŝovi frazon "Landa asocio, kiu estas malkontenta pri la laboro de sia komitatano A, rajtas lin revoki kaj nomi alian anstataŭ li". Li motivigas sian proponon per la fakto, ke komitatano A estas reprezentanto de la landa asocio, kiu delegas kaj sekve ankaŭ rajtas revoki.

S-roj Moritz kaj Lo Jacomo atentigas pri la neklareco de art. 22 kaj proponas doni al ĝi la formon de tabelo simila al tiu en la TEJO-statuto. S-ro Moritz kaj (por Esperantista Societo 'Bude Borjan') s-ino Borĉić kritikas la subreprezentigon de la fakaj asocioj kaj proponas formulon laŭ kiu ili rajtu al maksimume kvin (Moritz) kaj maksimume du (Borĉić) komitatanoj. S-ro Majchert proponas entute ne limigi la nombron de komitatanoj A.

Pri la nombro de Komitatanoj B ekzistas grandaj opinidiferencoj. Jen oni favoras proporcian reprezentigon de la individuaj membroj (s-ro Vogelmann), jen reprezentigon laŭ ilia ekonomia signifo por la Asocio (s-ro Lo Jacomo). S-ro Moritz proponas: "unu komitatano B por ĉiu komencita duonmilo ĝis la nombro de 10 komitatanoj B kaj super tiu nombro oni elektu nur unu komitatanon B por ĉiu komencita milo". S-ro Sekelj proponas ne limigi la nombron de B-komitatanoj. S-ro Sutton opinias necesa publike prezenti la kandidatojn por B-komitataneco ekz. per centvorta biografieto en la revuo.

Koncerne **Kondiĉojn de Komitataneco**, s-ino Borĉić rekomendas, ke oni limigu la oficdaŭron de komitatanoj al tri sinsekvaj deĵorperiodoj, kaj s-ro Lo Jacomo atentigas, ke la necesa daŭro de la membreco en UEA por kandidatoj por la Komitato ne estas klare esprimita, dum prof. Støp-Bowitz pripensigas, ke por ekster-eŭropaj komitatanoj montriĝos ĝena la verdikto "persone ĉeesti komitatkunsidojn". S-ro Moritz demandas, kial 'Komitatanoj B' ne rajtu nomi

'Anstataŭantojn', kaj s-ro de Smet pridubas la kapablon de UEA devigi siajn komitatanojn A nomi anstataŭantojn.

Fine, koncerne la **Rolon** de la Komitato, s-ro Moritz deziras ne limigi la nombron de estraranoj, sed fiksi minimumon je kvin. Li komentas ankaŭ la postan artikolon, pri TEJO. Laŭ li, la **Junulara Sekcio** "troviĝas sub la minaco perdi sian memstarecon" kaj li pledas por agnosko de aparta jura personeco por TEJO. Pluraj homoj atentigas pri la neklareco de art. 30, kaj, por solvi tiun problemon, s-roj Hamann kaj Staszczak proponas fini tiun artikolon per jena formulo: "sed por certigi la reprezentigon, TEJO havas en la Komitato unu komitatanon A".

La ĉapitro **Estraro** elvokis multajn komentojn. Dum s-roj Majchert, Verloren van Themaat, Beckers kaj Støp-Bowitz sin esprimas kontraŭ ia ajn limigo de la prezidanta mandato, s-ro Fighiera opinias, ke "la limigo de la prezidanta mandato estas tiel bona rimedo kontraŭ sklerozeco, ke mi proponas etendi ĝin al ĉiuj estraranoj"; lin subtenas ankaŭ s-ro Boulet. S-ino Borĉić pledas por limigo de oficdaŭro al "tri periodoj sinsekvaj" por la prezidanto, dum d-rino Gál rekomendas "elaste rilati" al la demando. S-ro Fighiera instigas malŝargi la prezidanton de pezaj formalaj taskoj per elekto de kongresprezidanto por la nekomitataj laboroj. S-ro Lo Jacomo demandas, ĉu la nuna forigo de la vortoj "prezidanto prezidas la Komitaton" (komparu la nun validan statuton) signifas, ke estonte elektiĝos komitatkunsida prezidanto.

Pri aliaj oficoj, oni sugestas fari distingon inter unua kaj dua vicprezidantoj, transpreni la tekston el la nun valida statuto koncerne la ĝeneralan sekretarion (s-ino Vincent) kaj specife mencii la ceterajn estraranojn (prof. Støp-Bowitz).

Pluraj personoj, precipe s-ro Woessink, atentigas pri neklareco en art. 37, **Voĉdonado**, kaj certe necesos

Serĉataj agantoj en sporta medio

POR PLANI sisteman propagandan agadon pri la uzado de la Internacia Lingvo en la sporta medio, esperantistoj pretaj kunlabori sur ĉi tiu laborkampo estas invitataj sendi sian nomon (kun adreso kaj telefonnumero) al **d-ro Gianfranco Polerani, viale Suzzani 2, I-20162 Milano, Italio**. D-ro Polerani, kiu estas komisiito de UEA pri sporta agado, bonvenigus ankaŭ la adresojn de sportistoj, sportaj funkciuloj, arbitraciantoj ktp., kiuj parolas aŭ favoras la Internacian Lingvon. En 1980 okazos kaj Vintraj (en Usono) kaj Someraj (en Soveta Unio) Olimpikoj. Tial estas grave, ke vi kiel eble plej baldaŭ reagu al ĉi tiu alvoko, pri kiu vi eventuale povus informi ankaŭ la esperantistojn, kiuj ne legas ĉi tiun revuon. Antaŭdankon pro via kunlaboro!

reformuli la vortumon. S-ro Karucin rekomendas, ke la **Biblioteko** disponigu ĉiujn verkojn en kaj pri la Internacia Lingvo al la membraro, ne nur la ĉefajn, ke ĝi kunlaboru kun aliaj bibliotekoj, kaj ke ĝi eldonu bibliografiojn.

Kiam temas pri **Financoj**, s-ro Moritz pledas, ke la Centra Oficejo respondecu kaj pri ordinaraĵoj kaj pri kapitalaĵoj, sub gvido de la estrarano pri financoj, kaj s-ro Woessink proponas menciigi en la artikolo 44 ankaŭ la jarajn kontojn.

S-ro Sekelj estas skeptika pri la ĉapitro **Ĝenerala Voĉdono**. Li proponas forstrekigi "en tempolimo de tri monatoj .. ktp.", ĉar la sola instanco, kiu rajtas fari gravajn decidojn, la ĉefkunveno de landa asocio, kutime nur unu-dufoje en la jaro kunvenas. Li rigardas punkton 47c) nerealigebla, ĉar individuaj membroj ne estas organizitaj, ne konas unu la alian ktp. Li proponas, ke tri-kvar aŭ dek individuaj membroj rajtu senpage anonci en la revuo sian deziron pri ĝenerala voĉdono kun la indiko, kiel sendi la voĉdonilojn.

Sam motive s-ro Vogelmann proponas: "Unu dekono de la nombro de la individuaj membroj povas postuli ĝeneralan voĉdonon". S-ro Woessink atentigas, ke ĉe art. 48 kaj art. 50 necesas modifoj pro lastatempaj ŝanĝoj en la Nederlanda Civila Kodo, kaj prof. Støp-

Bowitz rimarkas, ke mankas indiko pri la procedo por ŝanĝi la sidejon.

Du proponoj de s-ro Fighiera pri aldonoj al la statuto meritas apartan atenton. Li proponas, unue: "Grava akuzo aŭ konflikto estas esplorata de tripersona konfliktkomisiono, kiu, en kazo de konflikto, penas atingi pacan solvon. Ĝi rajtas proponi al la Estraro la eksigon de membro. Ĝiaj konkludoj estos submetitaj al la Komitato, pere de la Centra Oficejo, en la daŭro de tri monatoj ekde la ricevo de ĉiuj dokumentoj". Li ankaŭ sugestas, ke oni starigu "kolegion de estintaj prezidantoj". Eksprezidantoj, laŭ tiu propono, rajtus "ĉeesti ĉiujn kunvenojn de la Estraro" kvankam sen voĉdonrajto kaj sen kosto al la Asocio. "La Kolegio ... estas konsultata de la prezidanto kaj de la Estraro en aparte gravaj cirkonstancoj".

Leviĝis unu ĝenerala gramatika propono pri la teksto de la Statuto. Du opiniantoj esprimis sin kontraŭ la uzo de 'li' kiel persona pronomo por prezidanto, ĝenerala sekretario ktp. (s-ino Chaldecott, s-ro Hagemann). S-roj Hamann kaj Staszczak opinias la pronomon 'ĝi' tute taŭga ĉi-rilate.

Jürgen Hamann
Bolesław Staszczak

Kelkaj ĝeneralaj konsideroj pri la Statuto

LA RENOVIGO de la Statuto de UEA tre bone antaŭenmarŝas. Venadas grandparte pozitivaj reagoj ne nur de unuopuloj sed ankaŭ de lokaj kluboj kaj ĉe landaj asocioj, kiuj jam komencas trakti ĝin en siaj kunvenoj. Kompreneble, multaj homoj sugestas plibonigojn, atentigas pri kontraŭdiroj, donas bonajn sugestojn pri revortumoj, aŭ faras al ni malfacilajn demandojn. Kutime ni havas respondojn, sed ne ĉiam. Sendube la projekto, kiu fine venos al la Komitato en Lucerno, estos kelkrilate plibonigita kaj polurita dank' al viaj multaj saĝaj intervenoj.

Memoru, ke temas pri projekto, ne pri definitiva teksto. Ankoraŭ eblas farigi ŝanĝojn en la teksto mem, kiu iros al la Komitato, per konvinkaj argumentoj adresitaj al la Komisiono pri Statuto. Kaj, kompreneble, eblas interveni ĉe viaj komitatanoj por konvinki ilin, ke tiu aŭ alia ŝanĝo estas neprudenta aŭ nebezonata. Se tio malsukcesos, vi povos demokrate labori ĉe via landa asocio por konvinki ĝin, ke ĝi prenu difinitan starpunkton en la Ĝenerala Voĉdono. Cetere, temas pri ŝanĝoj en ekzistanta Statuto, ne pri nova statuto. Se la Komitato kaj membraro ne voĉdonos por difinita ŝanĝo, restos la nuna teksto.

La projekto celas plurrilate simpligi la ekzistantan tekston. Vi certe rimarkis, ke la nova teksto estas pli

mallonga ol la nun valida. Tio kompreneble neniel signifas, ke ni intencas ĉesigi tiun aŭ alian agadon menciitan en la malnova teksto. La fakto, ke ni simpligis la artikolon pri Celoj kaj Rimedoj, ne signifas, ke ni intencas ne plu plenumi la malnovajn Celojn aŭ ne plu uzi la malnovajn Rimedojn. La koncizigo de la tasko-prezento de la Estraro ne signifas, ke ni ne plu plenumos la taskojn detaligitajn en la malnova statuta teksto.

Ni certe pli vaste utiligos regularojn ol ni nun faras. Vi eble memoras, ke inter la celoj de la nuna Estraro (vidu la Taskaron Prioritatan, *Esperanto* 1978, p.91) estas plifortigo de la Delegita Reto. Sekve, nia tiutema statuta artikolo aludas al aparta regularo pri tio, kaj ni ne mencias plu en la Statuto plurajn aferojn, kiujn ni intencas transigi al la regularo. Ni antaŭvidas ellaboron de regularoj por kovri artikolojn 15 kaj 16 de la projekto (Kunlaboro kun Aliaj Asocioj) kaj eksplicite mencias tion en art. 15.

La eblecoj de kunlaboro kun aliaj asocioj estos konsiderinde vastigitaj. Kvankam niaj rilatoj kun ne-neŭtralaj asocioj estos ĉiam regataj de art. 5, laŭ kiu "UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, kaj tiuj sociaj kaj politikaj problemoj, kiuj ne estas lingvaj problemoj", tamen eblos starigi kunlaboron **sur neŭtrala tereno** kun ĉiuspecaj sociaj organizaĵoj — naciaj kaj internaciaj — kaj ankaŭ niaj jamaj kontraktoj kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko havos pli firman statutan bazon.

Gravas emfazi, ke la neŭtraleco de la Asocio restos sama kiel nun (escepte de tio, ke ni specife rekonos la egalecon de la seksoj, same kiel ni agnoskas tiun de

la rasoj, naciecoj, religioj). La landaj asocioj estos eksplicite devigataj “respekti la statuton de UEA, precipe ĝiajn celojn kaj ĝian neŭtralecon”. Ili ne rajtos limigi sian membraron nur al malgranda parto de la propraj civitanoj, kvankam ili ne estos regataj de la sama koncepto de neŭtraleco, kiu regas en la centra UEA mem.

La novajn artikolojn pri neŭtraleco inspiris principoj jam longe aplikataj en UEA, tiel sub la nuna Estraro, kiel sub antaŭaj. Profesoro Lapenna atentigis min, ke mi citis en mia enkonduko al la statutaj ŝanĝoj en decembro nur parton de la alineo el *Esperanto en perspektivo*, kiu priskribas la aplikon de la principo de neŭtraleco en UEA en la periodo 1948-73. Mi volonte kompletigas tiun citaĵon, ĉar tio donas al mi okazon denove emfazi la gravecon de tiuj vortoj. Jen la kompleta teksto:

“Interne de la Asocio la principo estis aplikata prudente elaste. Tiun elastecon diktis la fakto, ke la aliĝintaj asocioj de UEA troviĝas en landoj kun tre malsamaj politikaj reĝimoj kaj tial ankaŭ kun malsamaj konceptoj pri politika neŭtraleco. Io, kio estas rigardata kiel tute normale neŭtrala en unu politika medio, povas esti konsiderata kiel politike neneŭtrala en alia

medio. Rigore observante la reformulitan, vastan principon de neŭtraleco por UEA kiel tia, oni devis kompreneme rilati al kelkfojaj devojiĝoj en unuopaj landoj, se tiuj devojiĝoj ne afekciis iel serioze la neŭtralecon de UEA kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado en la mondo.” (p. 560)

Jen la esenca demando: la konservado de la neŭtraleco en la internacia sfero.

Kelkaj homoj timas, ke forigo de la frazo “principo UEA akceptas el unu regno nur unu landan asocion, sed la Komitato rajtas akcepti plurajn” malfermos la kluzojn al inundo de landaj asocioj el unu ‘regno’. Sed verdire jam laŭ la nuna Statuto ĉio dependas de la difino de la vorto ‘regno’. Kiel enloĝanto de lando, kiu enhavas kvindek da ŝtatoj, ĉiuj kun la propra jura sistemo kaj ŝtata parlamento, mi neniam antaŭe pripensis la abundajn perspektivojn, kiujn jam prezentas la ekzistanta Statuto! Mi dubas ĉu tia inundo okazos, kaj mi kredas, ke la Komitato ne tre simpatie rilatus al ĝi. Sed se vi ne dividas kun mi tiajn dubojn, ĉiam eblas proponi, ke ni lasu la frazon. Temas pri nia komuna Statuto, kaj pri projekto demokrate decidenda.

Humphrey Tonkin

Andreo Cseh 1895-1979



Andreo Cseh:
Homo, kiu fariĝis
legendo
jam dum sia vivo.

EN HAGO, Nederlando, la 9an de marto ĉi-jare forpasis Andreo Cseh, pastro kaj pacifisto, sed antaŭ ĉio alia, preskaŭ vivolonge, profesia esperantisto, honora membro de UEA. Cseh naskiĝis la 12an de septembro 1895 en Marosludas (nuna Ludoŝul-de-Moreș, Rumanio). Li lernis Esperanton en 1910 kaj pastrigis en 1919. En 1920, en la transilvania urbo Sibiu naskiĝis la Cseh-me-

todo, kiu al Andreo Cseh, sia kreinto, rapide portis la renomon de la plej sukcesa Esperanto-instruisto en la tuta historio de la lingvo. Fakte, la biografio de Cseh mem konsistas ĉefe el la kroniko pri la triumfa vojo de la Cseh-metodo tra la mondo kaj Movado: Marosvásárhely, Cluj, Bukareŝto, Ploesti (1921), propagandvojaĝo tra Eŭropo (1924-1927), Svedio (1928), Budapeŝto (1929), Nederlando (1930), Pollando, Estonio, Latvio, Germanio, Norvegio, Francio, Svislando kaj denove Nederlando (1931), kie la antaŭan jaron fondiĝis en Hago Internacia Cseh-Instituto kaj ekfunkciis Esperanto-Domo en Arnhem. Cseh pasigos la reston de sia unika vivo en Nederlando, vojaĝante nur al kongresoj kaj aliaj movadaj kunvenoj. En Hago li fondis kaj dum jardekoj redaktis la revuon *La praktiko* (1932-1970), kiun longe eldonadis Universala Ligo, pacifista organizaĵo, kies kunfondinto Cseh estis. Mankas ankoraŭ funda studo pri la fama instrumentado de Andreo Cseh, inter kies disĉiploj nombriĝis i.a. T. Morariu, H. Sepik, J. Baghy, Lidja Zamenhof, M. Saxl, J. Forge kaj M. Haudebine. Suprajaj deklaroj pri onidira malmoderiĝo de la metodo, pri ĝia spito al teorioj kaj rezisto al klasifikaj provoj — ne sufiĉas por rezigni pri tiu geniaĵo de Andreo Cseh. La metodo estas pionire aŭd-vida, kun programita sukceso. Necesas nur, ke ni aktualigu nin mem pri la ĉefverko de Andreo Cseh, homo, kiu fariĝis legendo kaj movada institucio jam dum sia neordinara, fruktodona vivo.

sm

Potenco de komuna historio

LA SVISA NACIO kaj ĝia ŝtato ne estas facile kompreneblaj, ĉar la ordinaraj reguloj, laŭ kiuj politikaj unuoj ekestas, ĉi tie ne validas. Nek komuna lingvo nek persona volo de reĝo aŭ imperiestro formis Svislandon, sed ĝi estas kvazaŭ kooperativo, kies membroj kuniĝis por efektiviĝi komunan celon, en nia kazo la defendon de la propra memstareco. Tio estis la deklarita celo de la unua federacia kontrakto, kiun la loĝantoj de la regionoj Uri, Schwyz kaj Unterwalden interkonsentis en la jaro 1291. En 1332 aliĝis al tiu ligo la urbo Lucerno, kaj tiamaniere la lago de la Kvar Kantonoj fariĝis la kerno de la juna konfederacio.

En konstantaj bataloj kun la familio Habsburg, kiu tiam posedis la plej grandan parton de norda Svislando, la konfederacioj ekkonis siajn kvalitojn kiel militistoj kaj altiris pliajn aliancinojn, inter kiuj Zürich kaj Bern estis la plej gravaj. Tiamaniere form-

iĝis ligo inter la kamparanoj de la senurbaj kantoj kaj la burĝoj en la malgrandaj urbaj respublikoj. Ankaŭ tio estis io eksterordinara en la epoko de la feŭdismo.

Per aliĝoj kaj konkeroj la teritorio de la konfederacio kreskis: ĝis la fino de la mezepoko (1500) proksimume la nunaj landlimoj estis atingitaj. Venkinte la potencan dukon de Burgundio, Karlo la Aŭdaca, en 1476, la konfederacioj fariĝis eŭropa grandpotenco, sed ili ne longe povis plenumi la politikajn devojn ligitajn al tia ŝtato, ĉar mankis al ili forta centra registaro kaj ĉar la reformacio splitis la landon kaj malebligis rapidajn komunajn decidojn. El tiu situacio kreskis la neŭtraleco, kiu poste fariĝis fundamenta principo.

La respekto, kiun la grandaj potencoj havis por la svisaj soldatoj, kiujn ili ŝatis dungi kiel soldulojn, certigis pacon al la konfederacio tra jarcentoj, sed dum la

ESPERANTO EN LA EŬROPA PARLAMENTO:

Oficiala reago

En la n-ro 878 de ĉi tiu gazeto aperis sur p. 26 komunikaĵo pri la sekvo donita de la Eŭropa Parlamento al la rezoluci-propono de s-roj Pisoni kaj aliaj, pri "eventuala enkonduko de Esperanto kiel laborlingvo de la Eŭropa Komunumo". Ĉar la Parlamento, t.e. ĝiaj membroj, certe en la nuna periodo antaŭanta al ĝia unua rekta elekto inter la 7a kaj 10a de junio ĉi-jare, ne estas nesentiva pri interesiĝo flanke de la civitanoj, kaj ĉar la alvoko al sendado de leteroj je la fino de la komunikaĵo* ne restis sen rezulto (en la momento de la skribado de ĉi tio pli ol 65 reagoj estas ricevitaj, inter kiuj de ekster la Komunumo, nome el Svislando, Svedio, Aŭstrio kaj Japanio), la sekva teksto servu kiel kompleto kaj klarigo, kaj pleje kiel respondo al la ricevitaj leteroj. La verkinto, kiel oficisto, nepre sin limigas al la faktoj, sen eniri la meritojn de la afero mem:

1. La Komisiono pri sociaj aferoj, laborebleco kaj instruado traktis la Raporton de Power pri "instruprob-lemoj en la Eŭropa Komunumo", enhavantan ankaŭ la Rezoluci-proponon de Pisoni, en siaj kunvenoj de la 21a kaj 25a de septembro kaj de la 19a de oktobro 1978. La resumo de la traktadoj — de si mem strikte konfidencaj — estas registrita en la n-ro 32 de la menciita raporto — citita de vi.

2. La unua — kaj sola — oficiala deklaro de la Eŭropa

* Eble pli konstruiva vojo estus laŭirita, se al la sekretario de la Komisiono pri sociaj aferoj estus sendita ekzemplero de via komunikaĵo, tuj post la apero.

2. La unua — kaj ĝis nun la sola — oficiala deklaro de la Eŭropa Parlamento, kiu priparolis la Raporton de Power en sia publika kunsido de novembro 1978, estas en la paragrafo 8 de la rezolucio akceptita la 16an de novembro, tekstanta jene:

juĝas nerealigebla fari Esperanton aŭ kiun ajn vivantan lingvon deviga kiel unua fremda lingvo (t.e. en la lerneja instruado).

Kiel motivaĵon de tiu ĉi vidpunkto oni povas konsideri la tie sekvantan paragrafon 9:

ne deziras, ke la enkonduko de komunik-rimedo gvidu al kultura supraĵeco, ĉar estas tre grave samtempe protekti la lingvojn kaj kulturojn de ĉiuj landoj de la Komunumo, inkluzive tiujn de etnaj kaj lingvaj minoritatoj, kaj precipe tiujn, kiuj ege riskas malaperi.

Ĉio tio tamen signifas, ke al la pritrakto de la rezoluci-propono estas dediĉite eble pli da atento ol povas ŝajni el la komunikaĵo. En la Parlamento cetere ne ekzistis plimulto por starpunkto alia, ol tiu notita en la citita paragrafo 8.

3. Intertempe nova iniciato estas farita per prezento de la Petskribo de Maertens rilatanta al:

plibonigo de la komunikado inter la civitanoj de la ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Komunumaro kaj inter la oficistoj ĉe la instancoj de la Eŭropa Komunumaro.

Ĉi tiu dokumento cetere traĵiros alian parlamentan vojon, kiel prezentite ĉi-sube.


* * *

Laŭ la Traktatoj de Parizo (1952) kaj Romo (1958) pri la fondo de la Eŭropa Komunumaro, la Eŭropa Parlamento, el pure jura vidpunkto, havas ĉefe konsiliajn kompetentecojn — kun escepto (de kelka tempo) —

napoleonaj militoj ankaŭ Svislando fariĝis eŭropa batalkampo, kie malamike renkontiĝis aŭstroj kaj rusoj kun la francoj. La Kongreso de Vieno (1815) faris tre gravan decidon, ĉar ĝi deklaris la neŭtralecon de Svislando kiel elementon de la interpopola juro donante samtempe la taskon al la svisoj mem defendi la integrecon de tiu neŭtraleco. Pro tio Svislando devas havi fortan armeon.

La politika decidpovo estas hodiaŭ certigita, ĉar en 1848 la konfederacio de tute memstaraj kantoj estis transformita en federacion, al kiu la kantoj devis cedi certajn rajtojn (mono, dogano, armeo, ekstera politiko). La centraj kompetentecoj havas tendencon kreski, sed tamen la aŭtonomio de la kantoj estas ankoraŭ konsiderinda.

La neŭtraleco estas principo de la ekstera politiko, kiu estas tiel forte enradikiĝinta en la konscio de la popolo, ke multaj homoj opinias, ke por Svislando neŭtraleco kaj ekstera politiko estas identaj. Pro tio ĝis nun Svislando ne aliĝis al Unuiĝintaj Nacioj — por tio estus necesa popola voĉdono, laŭ nia konstitucio, en kiu la popolo ĉiam havas la lastan decidon. Same, Svislando ne estas membro de la Eŭropa Komunumo.



Lucerno pitoreskas kun siaj turoj kaj pontoj lagoborde.

Aliflanke, Svislando kunlaboras tre aktive en la fakaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiel Unesko, Monda Organizo pri Sano, kaj multaj aliaj. En Ĝenevo troviĝas la eŭropa sidejo de UN. Pri la principo de la neŭtraleco oni neniam diskutas en Svislando, sed la

de la Komunuma Buĝeto, pri kiu la decida kompetenteco egale dividiĝas inter la Parlamento kaj la Konsilio de Ministroj.

El tiu ĉi konstato sekvas, ke oni ne povas atribui ligon forton al la deklaro de 1978 11 16 de la Parlamento.

La hodiaŭa kompetenteco de la Eŭropa Parlamento estas rigardata de multaj ties membroj ne kiel fina stadio; ĝi ja ne malebligas al la Parlamento sekvi la kutimajn parlamentajn procedurojn. Tiel ĉiuj membroj povas individue anonci punkton traktotan (en tiu ĉi kazo la rezoluci-proponon de Pisoni pri Esperanto); tia iniciato tiam estas, por preparo de la traktado en la plena kunveno, pludonata al la kompetenta(j) komisiono(j), ĉi-kaze la Komisiono pri sociaj aferoj, laborebleco kaj instruado.



Promeso pri apogo ankaŭ estonte: Parlamentano Pisoni alparolas esperantistan kunvenon en Trentino (Italio).

La intertempe prezentita Petskribo tamen estos pludonita al la Komisiono pri regularo kaj petskriboj (kiu pri ĝi petas la konsilon de la Komisiono pri instruado, sed mem decidas pri la sekvo donota al la Petskribo).

Sen malgrandigi la rolon kaj signifon de la Eŭropa Parlamento en la kadro de la Eŭropa Komunumaro, necesas antaŭ ĉio direkti la atenton al la artikolo 217 de la EEK-Traktato, laŭ kiu la ekstreme politik-sentiva *reguligo de la lingvouzado en la institucio de la Komunumaro. . . estas fiksata de la Konsilio per unuanimaj voĉoj* — sen ke estas necese eĉ peti la konsilon de la Eŭropa Parlamento.

W.J.C. van Miltenburg,
funkciulo de la Eŭropa Parlamento

REDAKCIA NOTO: Ĉi tiu reago de oficialulo de la Eŭropa Parlamento sukcese bildigas la vojon — kaj perdiĝon — de propono en administra kaj procedura labirinto de eŭropaj instancoj kaj institucioj. Dankon al la verkinto pro la utilaj klarigoj, kiuj devus interesi la funkciulojn de la Eŭropa Esperanto-Centro. Niajn legantojn interesas io alia, pri kio ĉi tiu reago ne parolas. Ni volus scii, kiel okazas, ke serioza propono, invitanta al raportoj pri funda esploro kaj komuna eksperimento (v. nian februaran numeron, p.26), post supraĵa pritrakto trafas la arkivon de la Eŭropa Parlamento. Ne estas por ni nova la aserto, komence de la apuda teksto, ke la parlamentanoj en la jaro de la unuaj rektaj balotoj por la Parlamento estas aparte sentemaj pri la starpunktoj de la balotontoj. Amuzas la apuda citaĵo pri la protekto de la minoritataj lingvoj kaj kulturoj en la Eŭropa Komunumo, kies instancojn ĉiam pli klare karakterizas lingvaj koloniismo kaj servuteco. Ne ni bezonas lecionon pri la lingvaj rajtoj de la homoj kaj popoloj.

demando, ĉu aliĝo al UN kaj la neŭtraleco kontraŭdiras unu la alian, estas temo, kiun oni nun volonte traktas kaj ankaŭ estonte ofte priparolos. Verŝajne post kelkaj jaroj la demando estos solvita.

Unu el la fenomenoj svisaj, kiu ĉiam trovis multe da atento en eksterlando, estas la paca kunekzistado de diversaj lingvoj. Estas eble necese diri antaŭ ĉio, ke sur la teritorio, kiu portas la nomon Svislando, ne vivas kune germanoj, francoj kaj italoj, sed svisoj, kiuj parolas germane, france kaj itale. Tio estas fundamenta diferenco. Ĝi pruvas la potencon de la historio. La diversaj popolpartoj de Svislando, kiuj rase apenaŭ distingas sin de siaj najbaroj, vivis kune dum jarcentoj, havas komunan historion kaj evoluigis komunajn morojn kaj komunan pensmanieron; ili fariĝis unu nacio. La lingva diverseco ne malhelpis tion.

Kompreneble, oni ne subtaksu la rolon de la lingvoj. Lingvaj limoj estas certaj bariloj, kaj la kulturaj interŝanĝoj trans tiuj limoj en Svislando estas malpli viglaj ol ni mem deziras. La ĉefaĵo tamen estas, ke la praktikan politikan vivon la lingvaj limoj ne influas.

Politikaj partioj, sindikatoj, profesiaj kaj kulturaj asocioj (eĉ tiu de la verkistoj) estas ĉiam organizitaj sur tutlanda bazo, do ne laŭ la lingvoj. En ĉiuj rilatoj regas plena egalrajteco, la nocio de minoritato ne ekzistas. Evidente la germana lingvo troviĝas en pli forta pozicio dank'al la pli granda nombro de parolantoj (4 070 289 germanlingvanoj, 1 134 010 francilingvanoj, 743 760 itallingvanoj, 50 339 romanĉlingvanoj). La germanlingvanoj kontraŭbalancas sian nombron per tio, ke ili pli diligente lernas aliajn lingvojn kaj neniam insistas pri sia plimulteco. La svisa sekreto nomiĝas: la plimulto devas esti pli tolerema ol la malplimulto. Sekvante tiun principon oni ne bezonas komplikajn lingvajn leĝojn. Tiaj tute ne ekzistas en Svislando, aŭ eble mi devus nomi en tiu rilato la leĝon, kiu certigas konsiderindajn federaciajn subvenciojn al la kantoj Grizono kaj Tiĉino, por ke tiuj povu pli efike evoluigi la romanĉan kaj italan lingvojn kaj kulturojn.

En malnovaj leksikonoj oni trovas ankoraŭ la indikon, ke Svislando havas tri naciajn lingvojn, sed iom post iom la scio disvastiĝis, ke estas kvar. Efektive, la kvara — la retoromanĉa — parolata nur de kvindek mil personoj, estas malgranda. Sed tio ne gravas en nia lando, kie la plej malgranda kanto en la federacio havas la samajn rajtojn kiel la plej granda. La romanĉa estas latinida lingvo, do parenca al la franca, portugala, rumana k.a. Ĝi estas tre interesa el multaj vidpunktoj, sed tion klarigi prenis tro da spaco. La aŭtoro devas atentigi en tiu rilato al sia libro *La fenomeno Svislando*, kiu estas verkita por la kongresanoj en Lucerno kaj tie estos donacita al ĉiu aliĝinto. En tiu libro, interalie, pli detale estas pritraktita ankaŭ la stranga rolo de la germana lingvo, al kiu mi povas nur mal-longe aludi en la ĉi-sekvanta alineo.

Se oni nomas romandan Svislandon franclingva, tio estas tute ĝusta, sed se oni nomas alemanan Svislandon germanlingva, oni tuj devas aldoni limigon de

tiu eldiro. Kiam germano aŭ iu persono, kiu bone lernis la germanan, venas al Lucerno aŭ alia svisa loko kaj aŭdas la homojn sur la strato aŭ en gastejo paroli inter si, li ne komprenas ilin. Ilia lingvo estas Schwyzertütsch, lingvo, kiu rekte evoluis el la mezepoka alemana dialekto. Tiu lingvo malsimilas al la germana proksimume samgrade kiel la nederlanda en sia rilato al la germana. Kontraŭe al la nederlandanoj la tiel nomataj germanvisoj nur malofte skribas sian lingvon, sed buŝe ili ĉiam uzas ĝin kun escepto de solenaj okaz-aĵoj. Skribe oni uzas — aliflanke — preskaŭ nur la germanan literaturan lingvon, kiun oni do ankaŭ trovas sur strat-tabuloj, en anoncoj kaj en la gazetoj. Ankaŭ la verkistoj ĝenerale preferas la literaturan germanan lingvon.

La dramoj de la du plej bone konataj nuntempaj svisaj verkistoj, Friedrich Dürrenmatt (1921-) kaj Max Frisch (1911-), estas verkitaj en la germana lingvo kaj sentraduke povis konkeri la germanajn teatrojn. Same verkis en la germana lingvo la tri plej famaj klasikaj verkistoj de Svislando: Jeremias Gotthelf (1797-1854), Gottfried Keller (1819-1890) kaj Conrad Ferdinand Meyer (1825-1898). La unua el tiuj tri ofte miksis sian svisgermanan kun la germana, dum ekzemple la tria tute evitas helvetismojn. Ankaŭ la granda pedagogo Heinrich Pestalozzi (1746-1827) verkis nur en la germana. Estas evidente, ke svisaj verkistoj uzante unu el la grandaj eŭropaj kulturlingvoj pli rapide povas konatiĝi trans la limoj kaj fariĝi influaj. Neniu bedaŭras, ke ekde la 17a jarcento la svisoj adoptis la germanan skriblingvon. En la ĉiutaga vivo tiu daŭra ŝanĝado inter parola kaj skriba lingvoj povas kaŭzi problemojn, sed ni vidas en ĝi pliriĉigon kaj daŭran mensan ekzercadon.

Oni povas demandi sin, ĉu inter la literaturoj en la diversaj lingvoj de Svislando ekzistas io komuna, ĉar



Svisoj: Malgraŭ multaj influoj — forta propra identeco.

evidente la influoj el Germanujo, Francujo, Italujo al la samlingvaj svisaj verkistoj estis fortaj. Tamen, estas facile konstati komunajn trajtojn. En svisaj literaturaj verkaĵoj oni regule povas observi la senton pri la rilatoj inter la ŝtato kaj la arto, moralan respondecon kaj tendencon al pedagogio. Oni ofte ŝerce diras, ke en ĉiu sviso estas kaŝita malgranda Pestalozzi; tio validas



Lago kaj montoj karakterizas Lucernon, kiu estas la unua turisma centro de Svislando. La monto Pilatus (en la fono) estas la simbolo de Lucerno, urbo de la 64a Universala Kongreso.

ankaŭ por la verkistoj, ĉu por la jam menciitaj germanlingvaj, ĉu por la du plej konataj romandaj: Jean Jacques Rousseau (1712-1778) kaj Germaine de Staël (1766-1817). Edukado estis unu el la grandaj temoj de Rousseau. Germaine de Staël instruis al la francoj kompreni la germanan kulturon; ŝi plenumis per sia verkado unu el la taskoj, por kiu ankaŭ ni disponigas nin plej volonte, tio estas peradi inter aliaj popoloj kaj iliaj kulturoj.

Se oni konsideras la propran svisan kontribuon al la monda kulturo, ĝi povas ŝajni modesta — ekzemple, ni neniam havis mondfaman komponiston aŭ filozofon —, sed se oni rigardas ĝin en proporcio kun la malgrandeco de la popolo, la nombro de elstaraj homoj estas konsiderinda. Mi jam nomis kelkajn verkistojn, sed meritis pli fundan pritraktadon ankaŭ diversaj pentristoj kiel Holbein, Füssli (Fusely) kaj Agasse, kiuj famiĝis en Anglujo, aŭ Böcklin kaj Hodler*, kiuj influis la germanan pentradon. En romanda Svislando aparte evoluigis la kompreno de la naturo kaj akiris renomon ekzemple Menn, Diday, Calame, de Meuron. Tre grava estas la kontribuo de svisoj al la scienco, kio esprimiĝas en la granda nombro de Nobelpremioj, kaj ni fieras — kvankam eble senmerite — ke Einstein, kiu estis svisa civitano, faris siajn epokfarajn eltrovojn en Bern.

La nuna stato de la svisa ekonomio estas tia, ke ĝi vekas la envion kaj la suspektojn de multaj eksterlandanoj. Ili forgesas, ke Svislando estas tre malriĉa lando. Ĝia tero enhavas nek oron, nek feron, nek karbon, nek nafton kaj sur la multaj montoj kreskas nenio krom rokoj kaj glacio. La svisoj estis devigataj uzi sian cerbon, se ili volis sekurigi sian ekziston en ĉi tiu mondo. Ekzistas proverbo “Mizero kreas inventemon”, kaj tio eble aparte estas pruvita en Svislando. La

svisoj devis fari eltrovojn, evoluigi la industrion kaj fari komercon. Hodiaŭ Svislando estas unu el la plej industriigitaj landoj en la mondo. Ĝiaj produktoj ĝuas bonan renomon: elektraĵoj, maŝinoj de ĉiuj specoj, modaj tekstilaĵoj, medikamentoj, farboj kaj — superflue diri — horloĝoj. Ankaŭ certaj manĝaĵoj estas ŝatataj sur la monda merkato, nome ĉokolado, fromaĝo kaj Nes-kafo. Grandan rolon ludas ankaŭ asekuroj kaj bankaj servoj. Kontraŭ nia volo ankaŭ la svisa franko fariĝis tre serĉata varo, kio kaŭzas, ke ĝia kurzo estas tiel alta, ke ĝi ĝenas niajn eksportojn kaj unu el niaj ĉefaj ekonomiaj branĉoj, nome la turismon.

La turismo ne estas invento de la svisoj, sed estis la eksterlandanoj — precipe la angloj — kiuj eltrovis, ke Svislando estas ideala lando por turismo. En la 18a jarcento la vojaĝado fariĝis modo, kaj tiam oni eltrovis, ke Svislando estas bela kaj inda celo por vojaĝoj. En la 19a jarcento la angloj kreis la alpinismon — ili kiel unuaj konkeris Matterhorn (Mont Cervin) —, kaj en la 20a jarcento Svislando fariĝis la paradizo de la skiistoj. La merito de la svisoj en la evoluo de la turismo estis ilia talento plenumi la dezirojn de la turistoj transformante la gastigadon en arton. En la 19a jarcento oni konstruis la hotelojn, kiuj respondis la gustojn de la klientoj, kaj oni komencis la konstruon de dentradaj fervojoj sur la famaj montoj kiel Pilatus, Rigi, Jungfrau. En la nuna jarcento oni adaptis sin al la ŝanĝiĝanta gusto, la reto de la fervojoj estis kompletigita per poŝtaj aŭtobusoj kaj en la skiregionoj la montoj estas kovritaj de ĉiuj specaj kablovojoj, telferoj kaj skiliftoj. Hodiaŭ la vintro estas pli grava sezono ol la somero. Intertempe ankaŭ la svisoj mem fariĝis turistoj, ili estas ege vojaĝemaj, kaj la laboro de la svisaj vojaĝoficejoj fariĝis duflanka, ili peradas vojaĝojn en la landon kaj el la lando. La hodiaŭa sviso estas samtempe izoligema erinaco kaj interrilatema kosmopolito.

* Temas pri pentristo kaj skulptisto Ferdinand Hodler (1853-1918), patro de la fondinto de UEA, Hector Hodler (1887-1920).

Arthur Baur

Provo krei modelan ekspozicion

MEZE DE 1977, iama berna bibliotekistino proponis al la direktoro de la svisa Nacia Biblioteko (kiu okupigas ekskluzive pri kolekto de presaĵoj kaj manuskriptoj rilatantaj al Svislando) organizi ekspozicion honore al la 75a datreveno de la fondiĝo de Svisa Esperanto-Societo. Malgraŭ la fakto, ke jam en 1947 en la samaj ejoj estis organizita fare de d-ro Arthur Baur ekspozicio pri presaĵoj en Esperanto, la direktoro (profesoro Maier), kiel li mem esprimiĝis pli malfrue, estis skeptika, ĉefe pri la kapablo de la esperantistoj organizi ion tre fakan.

La samon opiniis ankaŭ Svisa Esperanto-Societo, kiu neniel partoprenis la organizan laboron: nur ĉe la fino ĝi kontribuis per parta subvencio.

En septembro 1977 kunvenis en Berno la reprezentantoj de la svisa esperantista Kultura Komisiono, kiu arigas esperantistajn klerulojn kaj reprezentantojn rajtigitajn de ĉiuj Esperanto-uzantaj institucioj kun sidejo en Svislando. Tiu decidis, ke a) la ekspozicio okazos, kaj, post longa diskuto, ke b) ĝi estos dediĉita al la tuta problemo planlingvistika, nome al "Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando". Estis elektita laborgrupo, kiu, kun la financa apogo de Kultura Centro Esperantista, povis tuj eklabori.

La enhavon pretigis unuamomente s-roj Claude Gacond kaj Tazio Carlevaro. La tradukojn franc-

lingvajn faris s-ro Claude Piron kaj la tradukojn germanlingvajn d-ro Baur. Teknike helpis desegno-specialisto s-ro Joseph Chalverat kaj la grafikisto s-ro István Mórocz. Laste aliĝis s-ino Perla Martinelli kaj s-ro Giorgio Silfer. Cetere, multaj aliaj okaze helpis aŭ kunlaboris per material-havigo.

La laboro iĝis ĉiam pli granda kaj la tempo pli prema: dum la lastaj monatoj antaŭ la inaŭguro, la du ĉefaj motoroj, s-roj Gacond kaj Mórocz, renkontiĝis plurfoje semajne, kaj laboris ĉiufoje dum multaj horoj sinsekve por selekti la materialon kaj grafike aranĝi la tuton.

La konsisto de la ekspozicio

La ekspozicio konsistas el kvindeko da paneloj (temas pri fotografiaj afiŝoj) kaj el kvindeko da vitrinoj. Iuj paneloj (kaj respektivaj vitrinoj, t.e. montrokestoj) montras la lingvoproblemon en la mondo, kun speciala rigardo je la efikoj de tiu lingvoproblemo por Svislando; aliaj priskribas la internan lingvoproblemon en Svislando mem. Iuj paneloj koncernas la pratempon de interlingvistiko, nome la grandajn filozofojn Leibniz kaj Descartes, kaj ilian influon sur svisaj pensuloj (rilate internacian lingvon). Kelkaj paneloj estis dediĉitaj al la lastjarcentaj antaŭ- kaj postvolapükaj svisaj lingvoprojektoj: oni ne forgesis Volapük mem, kies lasta estro, s-ro Sprenger, estis sviso. Parto prezentas la Ido-krizon, la disvastiĝon de Ido, Occidental kaj Interlingua en Svislando.

La dua parto de la ekspozicio koncernas Esperanton: nome ĝiajn historion en Svislando kaj en la mondo, enradikiĝon en la kultura vivo de Svislando (kaj aparte en Romandio), kaj hodiaŭan disvastiĝon, en literaturo, scienco, beleto, kongresado, lernejoj, grupa vivo, organizaj sukcesoj, ktp. Originala estas la prezento de la lingvo mem, kie oni klarigas la eksteran aspekton latin-ĝermanan, la pulpon aglutinan kaj la kernon izolan de la lingvo.

Montriĝis necese starigi severajn principojn en la selekto de la materialo, por ke la montrokestoj ne estu tro plenaj. Ekzemple, oni aplikis la kriterion de la **unikeco** de la prezentata ero (ni disponis feliĉe pri la eblo ĉerpi el riĉaj privataj kolektoj — kaj aparte ĉe la ampleksa kolekto de Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo, en La Chaux-de-Fonds). Alia principo estis la **sviseco** (ekzemple, libro povas esti montrata kondiĉe, ke ĝi iel koncernas Svislandon). Krome, ni aplikis la principon de **hierarkia graveco**, laŭ kiu i.a. estas preferinda libro de svisa verkisto (eble ankaŭ eldonita ekster Svislando) ol libro de alilanda verkisto (eldonita en nia lando). Aŭ kiel ni faris ĉe Ido: nome ĉi ni montris poemon — kaj pro tio ne estas necese ekspozicii i.a. vortaron (ĉar se en plan-

Esperanto: la pionira periodo die Zeit der Bahnbrecher l'époque des pionniers l'epoca dei pionieri



Esperanto faciligas kolektadon kaj interŝanĝojn.
 Esperanto hilft Sammeln und Austauschen.
 L'espéranto aide les collectionneurs et les échanges.
 L'Esperanto facilita il collezionismo e lo scambio.



lingvo kreiĝis poemoj, tiam aŭtomate en ĝi ekzistas vortaroj).

La reeĥo

Okazis inaŭguro por ĵurnalistoj kaj por reprezentantoj de aliaj publikaj komunikiloj (radio kaj televido), kiu amplekse reeĥis: la ekspozicio sukcesis kapti la atenton de la publiko, kaj dank'al sia alta faka (interlingvistika kaj grafika) nivelo, kaj dank'al sia situo (en

grava publika landa klerulejo). Kelkajn tagojn poste, ankoraŭ en januaro, la oficiala inaŭguro por esperantistoj kunkondukis ĉ. 100 homojn al Berno. La inaŭguron sekvis oficiala invito al diskutado ĉe la sidejo de Svisa Radio Internacia. Komence de februaro kunvenis, ĉiam ĉe la Nacia Biblioteko, reprezentantoj de la ĉefaj planlingvaj movadoj, kiuj havas sidejon en Svislando (Esperanto, Ido, Occidental: la anoj de Interlingua preferis rezigni je partopreno verŝajne pro neklara timo). Tio estis historia evento (almenaŭ en Svislando), kiun ebligis la ekspozicio. De tiam, preskaŭ ĉiusabate okazas (ĝenerale esperantista) kunveno ĉe la Nacia Biblioteko.

La estonteco de la ekspozicio

La organizintoj laboris dum du jaroj, elspezis multege da forto kaj tempo, kaj, nelaste, ĉ. 10 000 frankojn por pretigi la ekspozicion. Estas do klare, ke ĝi ne povos tutsimple malaperi post 3-monata prezento ĉe la Nacia Biblioteko.

Unue ĝi vojaĝos. Ni jam scias, ke ĝi estos prezentita ĉe la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, dumkongrese ankaŭ en Lucerno (kie do la kongresontoj povos admiri ĝin) kaj en Bazelo.

Due, temas pri ekspozicio diserigebla (do organizita sur la bazo de 'ĉapitroj' sendependaj unuj de la aliaj). La ĉefa ĉapitro (estonte iom pliampleksigita) povos nomiĝi "Esperanto en Svislando kaj en la mondo", kiun oni povos prezenti aparte en formo, eble iom simpligita, en lernejoj, popoldomoj, bibliotekoj, ktp. (La unika materialo ne estos originala sed fotokopia, kaj la tuto estos akompanata de pretigota aŭdo-teksto, kun eventualaj diapozitivoj).

Trie, ĉar la paneloj estis faritaj el fotomaterialo, eblos reprodukti ilin samgrande aŭ redukte. Tiam la paneloj estos uzeblaj okaze de 'semajnoj de Esperanto' en urbaj magazenoj kaj vendejoj, estos vendataj por persona uzo al emuloj, kaj uziĝos en la pretigo de libro.

Tazio Carlevaro



Dum la inaŭgura tago en Berno: Multe da intereso, kiu ne malkreskis tra la tuta ekspozicia tempo en la Nacia Biblioteko.

Tschingel kaj aliaj famaj alpistoj

KIAM John de Brengle, monaĥo el Canterbury, trapasis Alpojn en 1188, li sentis sin iom afliktita. Li skribis: "Mi estis sur Jova Monto; je unu flanko, rigardante supren al la ĉielo de la montoj, je la alia, horortremante super la infero de la valoj, sentante, ke mi estas tiel multe pli proksima al la ĉielo, ke mi estas certa, ke mia preĝo estos aŭdita. 'Dio,' mi petis, 'redonu min al miaj kunfratoj tiel, ke mi povu diri al ili, ke ili neniam venu al ĉi tiu loko de turmentado.' Loko de turmentado, kie la marmora vojo de la ŝtona grundo estis glacio nur, kaj oni ne povis meti la piedon sekure; kie... estis tiel glite, ke oni apenaŭ povis stari, kaj la morto, en kiun oni tiel facile povus fali, estis nepra morto."

La timoj de Frato John respegulis la sintenon de la mondo ĝenerale al Alpoj, ĝis proksimume la fino de la 18a jarcento aŭ komenco de la 19a. Simple, oni enkapigis tiom da malbonaj aferoj pri la montoj, ke eĉ la indiĝenoj, kiuj loĝis sub iliaj ombroj, preferis akcepti tion, kion ili jam bone scias, kaj ne iri tro proksimen al la montaro. La svisoj mem timis de multaj diversaj bestoj, kiuj loĝis en la montoj, sed ĉefe la drakoj igis

ŝnurligi la gastojn firme al siaj vosto kaj forflugigi ilin al konvena loko.

Kiam Edward Whymper, unu el la plej gravaj montgrimpantoj en la historio de Alpoj, volis surgrimp la monton Matterhorn en la mezo de la 19a jarcento, oni avertis lin, ke la spiritoj de la damnitoj hantas la montojn — kredo, kiu ekzistis eĉ ĝis la komenco de la 20a jarcento.

Verkistoj de la frua 18a jarcento estis malkontentaj pri Alpoj. Horace Walpole, angla verkisto, restis iom malfeliĉa pro la lupoj, kiuj formangis lian hundon, dum Lady Mary Wortley Montagu, revenante el Turkio laŭ Monto Cenis, trovis la pejzaĝon "eternaj montoj, kovritaj je neĝo kaj nuboj, kiuj pendis sub niaj piedoj. Tio povus esti amuza, se mi suferus malpli pro la ekstrema malvarmo, kiu regas ĉi tie."

Tamen, tiu atmosfero de malvarmo, drakoj, sovaĝaj bestoj kaj minacaj montoj havis utilan efikon ĉe almenaŭ unu verkistino, ĉar ĝuste en Svislando Mary Shelley trovis la necesan hororon kaj inspiron verki la faman romanon *Frankenstein*, dum somero, kiun ŝi



vojaĝantojn senti sin malkomforte. Nu, la drakoj troviĝis, onidire, pleje en la ĉirkaŭaĵo de Kvarkantona Lago ĉe Lucerno, kie ili vintrodormis en grotoj ĉe la dek-livoj de Monto Pilatus, kaj ili estis tiel multnombraj, ke lokaj instancoj malpermesis al indiĝenoj aliri la monton.

Tamen, ne necesas, ke malkuraĝuloj timu iri al Svislando! Tiuj drakoj ne estis homvoruloj, male, kiam malatentaj vojaĝantoj enfalis iliajn kuŝejojn pro troa kapturigo aŭ alkoholo, la drakoj gastigis ilin dum la tuta vintro. Printempe, la drakoj estis tiel bonkoraj,

pasigis en tiu lando kun sia edzo (ankaŭ mondfama verkisto) kaj la poeto Byron. Enuigite pro la multa pluvo, ili organizis, dum semajnfino, konkurson inter si, por verki la plej timigan fantoman rakonton. *Frankenstein* estis la kontribuo de s-ino Shelley.

Montgrimpado kiel sporto ne vere komenciĝis ĝis la mezo de la 19a jarcento. Se oni feris en Alpoj, kutime oni celis nur marŝi, sub la tiel-nomata neĝo-limo. Unu el la plej famaj tiaj marŝantoj estis la poeto William Wordsworth, kiu en la poemo "Preludo" priskribis la spertojn, akiritajn dum piediro tra Alpoj. Li marŝis

kun amiko, kaj ili parole anticipis ĝuste la momenton de transiro. Ili parolis pri la beleco de Alpoj, de la pejzaĝo, grandeco de Alpoj, malgrandeco de la homo, ĝis — bedaŭrinde — ili subite rimarkis, ke ili jam transiris Alpojn, sed forgesis rimarki la precizan momenton de la transiro.

Konsiderante ĉion ĉi — la glitan surfacon, malvarmon, drakojn, malbonan veteron kaj aliajn timigajn aŭgurojn — oni povas nur aplaŭdi la kuraĝon de 18-jarulino Maria Paradis, kiu en 1808 atingis la pinton de Mont Blanc. Oni ne scias kial ŝi faris tion, ĉar ŝi evidente ne volis. Tamen, ŝi laboris en trinkejo, ĉe la subo de la monto, kaj eble esperis allogi klientojn per la rakontoj poste. Ŝi iris kun kelkaj viroj, kiuj kuraĝigis kaj helpis ŝin dum la grimpadon. Kiam finfine ŝi entute rezignis kaj proteste petegis ilin ĵeti ŝin en la plej proksiman fendegon, kaj pluiri solaj, ili ignoris ŝiajn petojn, tiris kaj puŝis ŝin, kaj tiris denove, ĝis ŝi finfine atingis la pinton. Ŝiaj rakontoj igis la trinkejon populara dum multaj jaroj poste.

Entuziasmo pri montgrimpado ne vere kreskis ĝis la mezo de la 19a jarcento. La unuaj grimpantoj estis sciencistoj, kiuj volis kompreni la konsiston de Alpoj — la geologoj, botanikistoj. Ili venis, provis, mezuris kaj fariĝis montgrimpantoj **pro** siaj sciencaj interesoj. Kiel komencon de grimpadon kun la nura celo konkeri la montojn, oni kutime agnoskas la atingon de la supro de la monto Wetterhorn en 1854, fare de Alfred Wills.

grimpantoj de tiu "Ora Epoko", nombris inter siaj membroj Leslie Stephen (patron de la angla verkistino Virginia Woolf), Edward Whymper (kies verko, *Scrambles Among the Alps*, estis tradukita en multajn lingvojn), John Ball (kiu dum jaroj estis redaktoro de *Alpine Journal*), Alfred Wills, kaj multajn aliajn.

Dum tiu "Ora Epoko" kreskis informoj pri Alpoj, kaj siavice granda entuziasmo, malgraŭ la fakto, ke la reĝino Viktoria publike malaprobis montgrimpadon. Tiu entuziasmo kaj furoro, tiu sento pri nova teritorio kiun oni devis konkeri, daŭris ĝis 1865, kiam okazis la katastrofa "akcidento Matterhorn", dum grimpo organizita de Edward Whymper. La juna Lord Francis Douglas, Whymper, kelkaj amatoroj kaj kelkaj gvidantoj estis kunŝnuritaj. Iu mispaŝis — iu falis — kaj malgraŭ ĉies klopodoj "la ŝnuro trafrotiĝis inter Taugwalder [la gvidanto] kaj Lord Francis Douglas. Dum kelkaj sekundoj ni vidis niajn kompatindajn amikojn glitantaj suben sur siaj dorsoj, kaj etendantaj siajn manojn, en vana klopodo savi sin. Ili iris for de nia vidatingo, nevunditaj, malaperante unu post la alia, kaj falis de krutegaĵo al krutegaĵo . . . De la momento kiam la ŝnuro krevis, estis neeble helpi ilin. Kaj tiel mortis niaj kamaradoj." La akcidento kaptis la atenton de la tuta Eŭropo kaj fariĝis debatojn pri la neceso kaj utileco de montgrimpado ĝenerale. Sed la akcidento kaj la debato venis jam kelkajn jarojn tro malfrue por haltigi la neeviteblan invadon de la ordinaraj turistoj.



Per tiu faro komenciĝis la "Ora Epoko" de la montgrimpado, kiu daŭris ĝis 1865, kiam oni konstatis, ke la ĉefaj pintoj jam estas konkeritaj. Post tio komenciĝis la tielnomata arĝenta periodo de la montgrimpado, kiu daŭris ĝis la fino de la jarcento.

En 1857, grupo de viroj en Londono fondis Alpistan Klubon, kun la celo renkontiĝi unu-dufoje dum la jaro, diskuti la proprajn spertojn, kaj eventuale publikigi revuon, kun informoj pri la diversaj malfacilaĵoj rilate montgrimpadon. Oni ne permesis al virinoj membriĝi. La Klubo, kies anoj estis la plej bonaj kaj plej famaj

Jes, Thomas Cook, kiu inventis grupvojaĝadon en la mezo de la 19a jarcento, en 1863 kondukis sian unuan grupon al Svislando, kie ili ludis, promenis, piknikis kaj ĝenerale svarmis amase ĉie, ŝajne ĝuante la imagitajn hororojn, estante nekonsciaj pri la veraj danĝeroj. Ili vizitis banlokojn, notis la speciale abundajn manĝojn kiujn ili ricevis, aĉetis memoraĵojn kaj, tute kontentaj, revenis al Britujo.

Kvankam estis multaj virinoj en tiu grupo de 62 personoj, kiun Cook gvidis, oni ne povas nomi ilin montgrimpantinoj. Sed tute serioza intereso pri Alpoj flanka-



ke de virinoj ekkreskis en la mezo de la 19a jarcento. Tamen, la ĉefa problemo, kiun ili devis fronti, ne estis la montoj, sed la vestoj. En la komenco, virinoj absolute ne povis eĉ pensi pri la ebleco porti pantalonon kaj, kun kutima brita bezono observi sociajn morojn, ili obstine grimpis portante longajn robojn. Iom post iom, ili komencis kompreni, ke tiuj longaj roboj ne nur malhelpas ilin, sed estas danĝeraj. Unu sinjorino rekomendis, ke oni alkudru malgrandajn ringojn en la orlo de la jupo, tra kiujn oni metu ŝnuron, tiel ke oni povu tiri la tutan robon supren rapide, laŭnecese. Tamen, tiu metodo montriĝis ne praktika, ĉar la ringoj pleniĝas je neĝo, kaj la tuta afero fiaskas.

Finfine la virinoj konkludis, ke la sola maniero sukcesi estis porti pantalonon sub la jupo, kaj, je iu punkto en la ekskurso, simple lasi la jupon ie (sub roko), kaj retrovi ĝin antaŭ ol reveni al la hotelo. Kutime oni juĝis, ke estas sekure fari tion, kiam oni vidas la lastan bovinon, ĉar verŝajne tio ankaŭ signifas, ke oni ne plu vidos homojn. Ĉiukaze, eĉ tiu metodo ne ĉiam estis sukcesa. Estas multaj onidiroj pri s-ino LeBlond, kiu spertis problemojn pri sia jupo. Foje, ŝi lasis ĝin sub roko, transiris la tutan monton, rememoris la jupon, kaj devis reveni la tutan vojon, por rehavi ĝin. Laŭ alia rakonto, lavango forportis la jupon, kiun ŝi estis kaŝinta ie. S-ino LeBlond estis inter la multaj virinoj, kiuj komencis serioze grimpi en la dua duono de la 19a jarcento. S-ino Brevoort akompanis sian nevon ĉie, kaj li (W.A.B. Coolidge) estis unu el la plej konataj mont-

grimpantoj. Sed la plej fama ino en la grupo estis ilia brava hundo Tschingel, amata de ĉiuj entuziasmoj pri Alpoj. Post ŝia konkero de Monto Rosa en 1869 oni elektis ŝin honora membro de Alpista Klubo. En la montoj, ŝi ĝenerale preferis aŭ ruĝan vinon, aŭ malvarman teon, por refreŝigi sin.

Oni ĝenerale multe laŭdis la virinojn kiuj grimpis, interalie, la sinjorinojn kiu mem gvidis sian grupon, kiam la vera gvidanto panikis kaj ne plu povis trovi la vojon. La sinjorinoj estis tute seriozaj pri siaj kapabloj, sed evidente ne sentis la saman devon kiel la viroj, verki pri la aventuroj. Ili ne sentis la bezonon de iu klubo, ĝis 1912, kiam oni fondis Virinan Apinistan Klubon, kaj, cetere, elektis s-ino LeBlond kiel prezidantinon.

La atmosfero en Svislando multe ŝanĝiĝis en la 19a jarcento. Dum la seriozuloj serioze grimpis, en la hoteloj, apud la fajroj, sidis la maljunuloj, kun siaj teleskopoj, rigardante, observante, kaj raportante pri ĉio vidita al la amikoj, kiuj restis ĉe la subo de la monto, sen la forto, sen intereso aŭ sen bezono atingi iun pinton. Ofte tiuj teleskopistoj montriĝis utilaj, ĉar, en okazo de akcidento aŭ aliaj problemoj, ili povis tuj voki helpon kaj doni instrukciojn, kie trovi la viktimojn. Inter tiuj, kiuj grimpis, kaj piede kaj teleskope, estis la fama usona aŭtoro Mark Twain.

Oni tiel freneziĝis pri Alpoj je la fino de la jarcento, ke eĉ novaj geedzaj paroj elektis pasigi la mielmonaton ĉe la pinto de monto. En 1928, Dorothy Pilley-Richards kaj la nova edzo, I.A. Richards, faris la unuan ascendon de Dent Blanche laŭ la norda flanko. En sia priskribo de la lastaj teruraj momentoj antaŭ ol atingi la pinton, en la plej grava danĝero, ŝi rakontas kiel la gvidanto trovis ilin, kune tenantaj, je la fino de siaj fortoj, unu malgrandan niĉeton. "Aĥ," li kriis, "la amantoj!"

Julie Tonkin



Benopeta ofero (1924), Lusin (1881-1936). El la ĉina. Pekino: Fremdlinga Eldonejo, 1978. 117p. (sen paĝnumeroj). Ilus. de Jonghiang, Hongjen kaj Jaŭ Kiaŭ. 24cm. 88-Es-150P. Bild-rakonta adaptaĵo de novelo pri virino luktanta kontraŭ la mal-humanaj moroj de la feŭda ĉina socio. Prezo: 2,40 gld.

Cvičebnice Esperanta (1961), Theodor Kilian (1894-1978). Praha: Státní Pedagogické Nakladatelství, 1978 (represo). 270p. Ilus. de J. Říha. 21cm. Bind. Lernolibro, kun pli ol sesdek paĝoj da legaĵoj kaj ampleksaj ĉefaj kaj Esperanta vortaretoj ambaŭ-direktaj. Prezo: 5,70 gld.

Esperanto and the Universal Esperanto Association. Rotterdam: UEA, 1977. 7p. 21cm. ED-12A. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?, Claude Piron (1931 -). Rotterdam: UEA, 1977. 32p. 21cm. ED-10E. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto et écoles européennes, Hubert X.L. Drabs. Rotterdam: UEA, 1977. 15p. 21cm. ED-1F. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto et l'Association Universelle d'Esperanto, L'. Rotterdam: UEA, 1977. 8p. 21cm. ED-2F. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto kaj la pliaĝuloj, Ilona Gál. Rotterdam: UEA, 1977. 23p. 21cm. ED-9E. Prezo: 3,00 gld.

Esperanto laŭ amuz-metodo; Skrypt dla kursu korespondencyjnego języka Esperanto, III semestr, Andrzej Pettyn (1937-). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, s.j. 50p. 20cm. Prezo: 2,40 gld.

Frithjof-sagao (1825), Esaias Tegnér (1782-1842). El la sveda trad. Wilhelm Theodor Oeste. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1976. 207p. 20cm. Plejado 2. Eposo pri la amo inter la heroo Frithjof kaj la reĝidino Ingeborg. Prezo: 19,80 gld.

Initiation à la nomenclature biologique nouvelle (NBN), W.M.A. De Smet. Kalmthout: Association pour l'Introduction de la Nomenclature Biologique Nouvelle, 1973. 44p. Mimeo. 27cm. Plendo anstataŭigi la latinan sistemon de biologia klasifado per Esperanta. Prezo: 6,90 gld.

Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto, Tyburcjusz Tyblewski. Rotterdam: UEA, 1977. 8p. 21cm. ED-6E. Prezo: 3,00 gld.

International travel by speakers of Esperanto, Tyburcjusz Tyblewski. Rotterdam: UEA, 1977. 8p. 21cm. ED-9A. Prezo: 3,00 gld.

Introduction to new biological nomenclature (NBN), An, W.M.A. De Smet. Kalmthout: Association for the Introduction of New Biological Nomenclature, 1974. 77p. 29cm. Plendo anstataŭigi la latinan sistemon de biologia klasifado per Esperanta. Prezo: 6,90 gld.

Language and the right to communicate, A-M. M'Bow, R.L. Harry, A. Isaksson, L.R. Sussman, H. Tonkin. Rotterdam: UEA, 1978. 40p. 21cm. ED-13A. Prezo: 3,00 gld.

Laŭ e...fika maniero kaj Nova e...fiko, Fikspronulo (ps.). Sen eldonindikoj (1978). 96+96p. 18cm. Bind. Trivialaj anekdotoj, tradukoj, kantoparodioj, vortlistoj. Prezo: 21,00 gld.

ĵus aperis

serio internacia diskutejo n-ro 6

projekto de

forigo de senlaboreco

(la rajto je laboro)

40 paĝoj pagu öS 54,—
al pĉk 7503.218 d-ro J. Hartl, viin
aŭ mendu ĉe UEA-libroservo

Libro de amo (1965), Peter Peneter (1891-1953) kaj Georgo Peterido Peneter (1931? -?). Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969 (fakte fotorepreso 1979). 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran amrakonton *Sekretaj sonetoj* (1931) kun ties "Komplezaj klarigoj" (rimforma erotika terminaro), tradukojn kaj parodiojn de la verkoj de J.M. de Heredia, diversajn aliajn tradukojn el la monda literaturo amortema, kaj multe pli. Prezo: 24,00 gld.

Lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro, La, Werner Bornmann. Rotterdam: UEA, 1977. 8p. 21cm. ED-8E. Prezo: 3,00 gld.

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, John Wells (1939-). Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 24cm. ISBN 92 9017 021 2. Moderna scienca prezento de la fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko de la Internacia Lingvo. Prezo: 12,00 gld.

Mia kaŝita vivo; Mallonga aŭtobiografio de iu neortodoksa esperantisto, Takamaru Sasaki (1898-). Tokio: Asake-Syoboo, 1978. 40p. 21cm. Kvazaŭ suplemento al la *Historieto* de Miyamoto, kun aparta atento al la socialisma E-movado en Japanio. Prezo: 3,00 gld.

Politika neperforto (1976), Movado por Alternativo Neperforta. El la franca trad. la Pacista Frakcio de SAT. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 59p. Mimeo. 21cm. LJP-brosuro 129B. "Por memmastruma socialismo". Prezo: 3,00 gld.

Pri lingvo kaj aliaj artoj, William Auld (1924-). Antverpeno/ La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 216p. 21cm. Movado 7. ISBN 90 6336 006 1. Dek kvin eseoj, pri la lingvo Esperanto ("Mitoj kaj faktoj pri Esperanto") kaj ties literaturo traduka ("La internacia lingvo kiel belarta tradukilo") kaj originala ("Pasivo-Pasio" pri Miĥalski, "Londono tra lupeo" pri Sturmer). Prezo: 18,00 gld.

Problèmes linguistiques et l'Acte Final, Les. Rotterdam: UEA, 1978. 12p. 21cm. ED-3F. Commentaire et recommandations relatifs à l'application de l'Acte Final de la Conférence sur la sécurité et la coopération en Europe. Prezo: 3,00 gld.

Revizoro, La (1836), N.V. Gogol (1809-1852). El la rusa trad. L.L. Zamenhof (1907). Oosaka: Japania Esperanta Librokooperativo, 1978 (neindikita; fotorepreso de la 2a eld.). 99p. Bindita. 21cm. Komedio en kiu koruptaj oficuloj erare supozas, ke vizitanto al la vilaĝo estas inkognita revizoro. Filologie interesa pro la pionira provo rekrei dialektajn en Esperanto. Prezo: 19,50 gld.

Streĉita kordo (1931), K. Kalocsay (1891-1976). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1978 (fotorepreso). 196p. 20cm. La ĉefa originala verskolekto de la elstara poeto. Meĵloŝtono nemalhavebla por la serioza studento de la Esperanta literaturo. Prezo: 19,80 gld.

Una ampla mirada, J.K. Hammer. Trad. el Esperanto Josep-Maria Pi. Skolta Esperanto-Ligo, 1978 (ne indikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Malfermu pordojn per la Pasporta Servo!

Ĵus aperis la nova listo de gastigantoj. Denove en 1979 ĉi tiu servo de TEJO grandiĝas. Ĝi prezentas al vi 320 tranoktejojn en 44 landoj. Aĉetante la liston (15 francaj frankoj aŭ 10 irpk.) vi aŭtomate aliĝas al la Servo. Mendoj kaj detaloj ĉe: J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Pĉk. 25 426-58 Paris.



• **Ĉilio:** En ĉi tiu rubriko de nia januara numero (p. 16) aperis mallonga informo pri decembra kursofino en la Pedagogia Instituto de la Universitato de Ĉilio en Santiago. Venis kun la informo ankaŭ la supra foto, sed ni ne sukcesis plekti ĝin en la paĝon. Poste atingis nin numero 6 de "La verda sago", revueto de Ĉilia Esperanto-Asocio. La numero enhavis noton pri nia januara mencio kaj esperon, kiu tekstis: "Eble en venonta numero de tiu revuo [nia] aperos foto pri la evento." Nu, la ruzajo sukcesis! Jen la ĉilia foto por gajni refojan mencion en "La verda sago", cetere tute interesa kaj utila informilo.

Urugvajo

• Post plurjara silento oni nun faras seriozajn paŝojn por reaktivigi la iaman landan asocion de UEA en Urugvajo. La ĉefa aganto estas inĝ. Alberto Baroccas, eldoninto de la faka Esperanta revuo *Kemio internacia*. Laŭ informo de nia ĉefdelegito, d-ro R. Zeballos Morales, restas por plenumi nur kelkaj formalajoj antaŭ oficiala restarigo de Urugvaja Esperanto-Societo.

Greklando

• En du Esperanto-kursoj en la Fervojista Klubo en Ateno la lingvon lernas ĉ. 50 personoj. La kursojn gvidas ges-roj Sakellaropoulos.

Kanado

• Kanada Esperanto-Asocio stipendios ĉi-jare la partoprenon de du siaj junaj membroj por ĉeesti la 64an UK en Lucerno. La stipendiojn (po 500,00 kanadaj dolaroj) povas ricevi gejunuloj, kiuj estos malpli ol 25-jaraj meze de ĉi tiu jaro kaj promesos aktivi en la Esperanto-movado dum la sekvantaj du jaroj. Similajn stipendiojn dum la lastaj jaroj donas ankaŭ Japana Esperanto-Instituto kaj Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo (Britio).

FR Germanio

• Okaze de la balotoj por la Eŭropa Parlamento, inter la 7a kaj 10a de junio ĉi-jare (v. ankaŭ p. 66), membroj de Germana Esperanto-Asocio starigas publikajn demandojn al la gekandidatoj en FR Germanio pri la solvo de la lingvoproblemo en Eŭro-

po kaj pri starpunkto rilate Esperanton. En Münster respondis d-rino G. Peus (kristan-demokrata partio) jene: "Kiel dua lingvo por ĉiuj eŭropanoj al mi ŝajnas esti pli taŭga unu el la kreskintaj, per tradicio kaj kulturo provizitaj eŭropaj lingvoj — la angla aŭ la franca —, ol artefarita lingvo." La kandidatino ne kuraĝis akcepti inviton al publika debato. La nuna elektokampanjo ĉiukaze donas al la esperantistoj eblecon elstarigi la problemojn, kiujn en Eŭropa Komunumo kreas la nesolvita lingva demando.

Ĉeĥoslovakio

• *Kontinento sen interpretistoj*, tio estas la titolo de 140-paĝa ĉeĥlingva libro de O. Kníchal, eldonita antaŭ nelonge de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La aŭtoro, de kiu jam antaŭe aperis kelkaj verkoj pri kaj en Esperanto, skizas en dek ĉapitroj de la nova libro la problemon de la multlingveco, historion de la internacilingva ideo kaj de la Zamenhofa lingvo kaj la Esperanto-movado. Aplikado, atingoj kaj perspektivoj de la Internacia Lingvo estas prezentitaj per studoj pri la gravaj eventoj kaj fenomenoj de Esperanto (literaturo, scienco, laborista movado, agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj, lingvoproblemo en la nuna mondo ktp). Elektro de kelkaj gravaj dokumentoj kaj eldiroj pri Esperanto kompletigas la verkon, el kiu la enlanda gazetaro jam reprenis plurajn erojn.



• **Hispanio:** Iom pli ol unu jaron en Barcelono funkcias kataluna librovendejo "Llibreria Esperanto", fondita por subteni la laboron de Barcelona Esperanto-Centro. Ni demandis s-ron S. Aragay, proprietulon, kiel prosperas la komerco. Li kontentas, same kiel kelkcento da regulaj klientoj, kiuj tie povas aĉeti ankaŭ E-librojn. Furoris dum la unua laborjaro Esperantaj lerniloj, de kiuj vendiĝis kelkcento da ekzempleroj. Bela fonto por pliaj movadaj enspezoj!



- **Lernejoj:** Vigleco dum Esperanta instruhoro en la Elementa lernejo "Vuk Karađić" en Pirot (Jugoslavio), kie s-ro Jovan Pavlović (staranta) jam instruis Esperanton al miloj da gelernantoj dum la pasintaj tri jardekoj.

Eksteraj rilatoj

- Fine de februaro s-ro Csaba Lendvay, vicprezidanto de TEJO pri eksteraj rilatoj, kaj s-ino Barbara Despiney, TEJO-representanto en Parizo, partoprenis en junulara konferenco pri rasismo, organizita ĉe Unesko fare de la Internacia Unuiĝo de Studentoj. La partopreno, kiu okazis conforme al la speciala laborplano de UEA okaze de la jardeko por kontraŭbatali rasismen kaj rasan diskriminacion, donis al la reprezentantoj de TEJO okazon interveni per atentigo pri la lingvaj kaj kulturaj dimensioj de rasismo. Lendvay kaj Despiney profitis la okazon por konatiĝi kun aliaj junularaj movadoj kaj organizaĵoj.

Informado

- Societo de Amikoj de la Internacia Lingvo Esperanto (Ul. G. Principa 50, YU-11000 Beograd, Jugoslavio), antaŭ unu jaro (en aprilo 1978) komencis eldonadi nacilingvan dumonatan gazeton *Esperanto*, kies celo estas informadi ĝenerale pri la monda lingvoproblemo. Ĝi estas interese redaktata, bone presita, enhavas multajn praktikajn informojn (adresojn de la Esperanto-societoj kaj instancoj, informojn pri la instruado en lernejoj, liston de haveblaj lerniloj) kaj Esperanto-kurson por gejunuloj. Grave, la gazeto estas malmultekosta (ĉ. 0,50 gld. por unu numero). Redaktas d-ro P. Marinković, M. Ocokoljić k.a.

Fervojistoj

- La Internacian Fervojistan Esperanto-Skisemajnon (IFES) en Maria Alm, Aŭstrio, inter la 17a kaj 24a de

marto, partoprenis 85 personoj el 8 landoj. Neĝo malabundis sed sufiĉis por ĉiutaga skiado kaj diversaj konkursoj. Fina gajno de pokalo dependis ne nur de skisportaj kapabloj sed same de skriba konkurso kun demandoj pri Aŭstrio, fervojo, internaciaj aferoj kaj vintroporto. Aparte oni honoris Johanon Geroldinger, iniciatinton de IFES. Elstaris el la programo aŭtobusa ekskurso kaj originale verkita skeĉo de grupeto el Parizo. La venontjara IFES okazos en Plan, Val Gardena, Italio.

Radio

- Laŭ statistiko ellaborita de s-ro Georges Larglantier, redaktoro de la radio-rubriko en nia revuo, en 1978 okazis 2 788 radio-elsendoj en la Internacia Lingvo (en 1977 estis 2 523 elsendoj). Tiuj programoj disaŭdiĝis pere de 15 radio-stacioj (14 en 1977) en 11 landoj. Ne temas ĉi tie pri nacilingvaj programoj dediĉitaj al Esperanto, sed nur pri regulaj elsendoj en la Internacia Lingvo. Tiuj elsendoj daŭris entute 1 018 horojn (947 en 1977), el kio pli ol duono ŝuldiĝis al la ĉiutagaj elsendoj de la Pola Radio.

Persone

Armand Su

- "Mi estis arestita en aprilo 1968 pro la t.n. kontraŭrevolucia aktiveco (inkluzive de mia poezia agado en Esperanto) kaj estis poste kondamnita je 20 jaroj. Dum dek jaroj en malliberejo mi i.a. sekrete instruis Esperanton al kelkaj junaj malliberuloj, inter kiuj pleje diligentis Meng Vej kaj Jan Ke. Mi elkarceriĝis en



januaro 1979 kaj estis deklarita tute senkulpa." Tiel skribis al ni komence de marto s-ro Armand Su (138 Lingchien, Lo Yang Dao, Tientsin, Ĉinio), pli-malpli la sola ĉina esperantisto, kiu ĝis la nun klarigita malapero en 1968 havis firmajn kontaktojn kun la internacia Movado kaj kunlaboris en la Esperanta gazetaro (v. ekz. nian revuon de februaro 1964). Sur la foto: Armand Su (dekstre)

kaj lia nova (post la liberiĝo) lernanto de Esperanto, Van Ĵue-sian, 18-jara studento el Pekino.

Fighiera-Sikorska

- Kiel anoncote en nia januara numero (p. 17), s-ino Ada Fighiera-Sikorska, redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, fine de marto definitive translokiĝis al Hispanio. La nova adreso de la redakcio de *Heroldo* estas: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6°, A., Madrid 20, Hispanio.

Van Heugten

- Nederlanda verkisto kaj ĵurnalisto W.A.M. van Heugten, kiu kelkfoje recenzis ankaŭ por nia revuo, forvojaĝis fine de marto al Danlando kaj Svedio por prelegi pri Strigspegulo, heroo de mezepokaj rakontoj, hejmigintaj i.a. en Belgio, Nederlando, Germanio kaj Danlando. En Esperanto ekzistas malgranda libreto *Ulenspieghel, tio estas Strigspegulo*, kaj antaŭ kelkaj jaroj aŭdiĝis onidiroj pri baldaŭa eldono eĉ de du ampleksaj volumoj pri Strigspegulo, sed neniu el ili ĝis nun aperis.

Aliĝu al movadlernejo

Dum kelkaj lastaj jaroj, ĉ. 15 personoj el deko da landoj de kvar kontinentoj frekventis tiun unikan lernejon de la Esperanto-movado. Jes, oni helpas kaj serioze laboras tie. Sed, krome, ĉiuj ĝisnunaj laborintoj lernis amason da aferoj pri la Movado kaj komencis orientiĝi en kaj pri ĝi. Pluraj lernis tutajn metiojn: kompostadon, teknikan redaktadon, librovendadon, fotadon ktp.

Ĉu vi ŝatus aliĝi al tiu lernejo? Ni nun denove serĉas volontulojn, principe por unujara periodo. Memoru tamen, ke necesas esti malpli ol 29-jara, bone koni Esperanton, havi tajpkapablon kaj esti lernema. Pri pliaj detaloj skribu baldaŭ al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rapidu, ĉar nia lernejo havas limigitan kapaciton! Skribu tuj!

FRITS FAULHABER (1893-1979) forpasis la 2an de marto en Amsterdamo, Nederlando. Esperantisto de post 1912, li estis tra pluraj jardekoj unu el la simboloj de la Esperantomovado en sia lando. Faulhaber aktivis ĉefe en la laboristaj rondoj: estrarano 1920-1923, redaktoro de *Arbeider Esperantist* inter 1927 kaj 1934, prezidanto de ekzamena komitato ktp. Tamen, lia ĉefa kontribuo al Esperanto estas pli lingva ol movada. Faulhaber verkis tutan aron da nederlandlingvaj E-lerniloj, el kiuj pluraj akiris internacian renomon: *Tra la labirinto de la gramatiko* (8 eldonoj de post 1934); *La komencanto kaj Post la kurso* (kun G.P. de Bruin, 1937); *Ne tiel, sed tiel ĉi – konsilaro pri stilo* (1965); *Esperanta mozaiko* (1967); *Faulhaber rakontas* (1972). Li estis ankaŭ fruktodona tradukisto: *La nevenkebla ĝeno* (1939); *La mondo ne havas atendejon* (1951); *Dekkinga fuĝas* (1957); *La papalagoj* (1963). Dum multaj jaroj Faulhaber estis membro de la Akademio de Esperanto.

NID DUTRA D'AMORIM (1926-1979) mortis en trafika akcidento la 4an de januaro en Brazilio, kie li estis delegito kaj fakdelegito de UEA. D-ro N. Dutra d'Amorim estis prezidanto de la brazila ĉefurba E-organizaĵo kaj prezidanto de la iniciata komitato por Universala Kongreso en Brazilo. Li estis alta ŝtata funkciulo.

SALVADOR OLIVAN HERNANDO (1889-1978) mortis la 8an de decembro en Vigo, Hispanio, kie li aktivis por Esperanto de post 1924.

Oficiala Informilo

N-ro 524

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Francio: J. Amouroux

SOCIETO ZAMENHOF 1978

JAP: 220 Hideo Shinoda.

SOCIETO ZAMENHOF 1979

BELG: 69 André Degryse; 70 Van Ginderen-Martens; 71 Cesar Vanbiervliet; 72 Jules Verstraeten; 73 Germaine Wolff. BRAZ: 74 F. de Souza Almada; 75 Marija Pozder Almada. ITAL: 76 Adelina Casetta. JAP: 77 Seiji Kato; 78 Hideo Shinoda. KAN: 79 Dorothy M. Hawley. NED: 80 J. Flach. SVISL: 81 Margit

Guldin. US: 82 Margaret L. Barkley; 83 William J. Ford; 84 Ĝigi Harabagiu; 85 Adrian Hughes; 86 R. Kent Jones; 87 Daniel L. Mason; 88 W. Campbell Nelson; 89 Julie L. Regal; 90 Robert Swenson; 91 Ken Thomson. FR GERM: 92 Ellen Eggers; 93 Hertha Franck; 94 Helene Hiebel; 95 Hans Schütt. BRIT: 96 Kenneth Sly; 97 W.G. Atkinson. BRAZ: 98 A.K. Alfonso Costa; 99 Nydia Aydos Krieger. FRANC: 100 Jean-Paul Beau; 101 Fernand Charlet; 102 H. Dabezies. FR GERM: 103 Kurt Schönrich. NED: 104 Akiko Woessink-Nagata; 105 E.J. Woessink. NORV: 106 Olaf Maeland. SVED: 107 Maja Ahlström; 108 Paul Almen; 109 Harald Andersson; 110 Martha Andreasson; 111 Karl Gustafsson; 112 Ragnar Hjorth; 113 Jim Hornö; 114 Ethel Johansson; 115 Barbro Karlsson; 116 Bror Lindström; 117 Amy Nilsson; 118 Edla Nilsson; 119 Gustav Nygård; 120 Einar Rasmussen. US: 121 Humphrey Tonkin; 122 Julie Tonkin. VENEZ: 123 Carlos Levay.

DONACOJ 1979 (Gld.) (ĝis la 31a de januaro)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Hispanio: M. Gutierrez Aduriz 24,38.
FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: Memore al Hertha Wilke 59,38.

VESELIN DAMJANOV kantatas en esperanto

Tiu bela gramofondisko estis havebla por antaŭmendintoj dum la 63a UK en Varno. Fine, nun ĝi estas havebla ankaŭ por la aliaj klientoj de la Libroservo de UEA, kiu aĉetis la tutan restantan stokon kaj por la samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj donas 33-procentan rabaton. Estas riske atendi! Mendu tuj!

VESELIN DAMJANOV KANTAS EN ESPERANTO. Pianakompano de E. Komarov. Sofia: Balkanton, 1978. 30cm. 33t/m, duflanka, stereofona. BOA 2180. Dek du kantoj en profesia interpreto de esprimriĉa baritono. Prezo: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Italio: M. Bardini 33,00. Nederlando: R. Moerbeek 71,50. Sumo ĉi-jara: 163,88.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: Anonima 50,00.

ĜENERALA KASO: Anonima: 150,75. Belgio: S. De Weerd 31,80. Japanio: F. Egami 50,00. Kanado: D. Hawley 226,92. Nederlando: W. van Eyndthoven 30,00. Svedio: E. Carlén 49,15. Diversaj malgrandaj 16,25. Sumo ĉi-jara: 554,87.

PATRONOJ DE TEJO: 1 J. Wilson, Nov-Zelando. 2 W.Th. Oeste, FR Germanio. 3 G. Becker, FR Germanio. 4 P. Zlatnar, Jugoslavio. 5 M. Meijwes, Nederlando. 6 L. Anjer, Norvegio. 7 D.J. Langman, Nov-Zelando. 8 Thomas Jansson, Svedio. 9 F. Swift, Nov-Zelando. 10 S. Martina, Italio. 11 J.S. Douma, Nederlando. 13 M. Bardini, Italio. 14 H. M. Schippers, Nederlando.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA



ELEKTITAJ FABLOJ de I.A. Krilov. El la rusa trad. S.G. Rublov. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p. 21cm. ISBN 90 6336 009 6, Belliteratura eldonserio 35. Prezo: 21,00 gld.

Krilov:

elektitaj

FABLOJ

Kun Ezopo kaj Jean de La Fontaine, Ivan Andrejeviĉ Krilov (1768-1844) formas la grandan triopon de fablistoj en la monda literaturo. Tial ĉi tiu impona volumo en versa traduko de Sergej Grigorjeviĉ Rublov, malnova tradukmajstro, eniris la prestiĝan kolekton Serio Oriento-Okcidento. La libro estas riĉe ilustrita.

LA LIBROSERVO
DE UEA ESTAS
ĈEFA DISTRIBU-
ANTO DE ĈIUJ
TK-ELDONAĴOJ.



ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 27

(pri la demando vidu nian martan numeron)

A. La aŭtoro de la rakonto "La Radioj de Roentgen" estas Leo Belmont, pseŭdonimo de la eminenta pola pionira esperantisto Leopold Blumenthal. Li ne verkis la novelon originale en Esperanto. Lia samlandano Kabe (Kazimierz Bein) faris la tradukon, kiu estis eldonita en Riga en 1911.

B. En la romano *Saltego trans jar-miloj* (eldonita en 1924 kaj denove en 1973), Jean Forge, pseŭdonimo de la pola filmisto Jan Fethke, preskribas vojaĝon en la pasinteco al la antikva Romo dum la regado de la imperiestro Nerono, per la inventaĵo de prof. Fromaĝi.

C. La inventaĵo de la teknokratoj funkcias en la triakta lirika komedio *Songe sub pomarbo* verkita de la hungara aktoro kaj poeto Julio Baghy kaj eldonita en 1958.

Ĉ. La hungara inĝeniero-aŭtoro Sándor Szathmári rakontas pri la kompozono, kiu fine kaŭzis la formortiĝon de la muziko sur la Tero dum la antaŭatoma epoko. Lia novelo "Dokumentoj por la historio de la kompozono" troviĝas en la novelkolekto *Maŝinmondo* (1964).

D. "La Tradukmaŝino" estas sciencfikcia novelo verkita de la japana

aŭtoro Gaku Konisi. Ĝi aperis la unuan fojon en *La revuo orienta* (1962) kaj estas represita en lia novelaro *Vage tra la dimensioj* (1976).

DEMANDO 28

(la respondo aperos en nia maja numero)

Ĉi-jare la 64-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Lucerno, Svislando, do la gastiganta lando la sesan fojon fariĝos kongreslando. En la historio de la Esperanto-movado svislandaj esperantistoj plurfacete rolis kiel organizantoj, verkistoj kaj disvastigantoj de informoj pri la Internacia Lingvo. Ĉu vi povas identigi dek el ili laŭ la priskribo de kelkaj el iliaj kontribuoj?

A. Eminentia publicisto, teologo kaj profesoro pri filozofio en Ĝenevo submetis al la Franca Akademio pri Moralaj kaj Politikaj Sciencoj en 1899 raporton pri la graveco de internacia lingvo kaj esprimis favoran opinion pri Esperanto. Lia verko *La devo* estis tradukita en Esperanton fare de samlandano (C).

B. Ĵurnalisto kaj eldonisto kunfondis Svisan Esperanto-Societon en 1902. Li aktivis ankaŭ en Germanio, kie li kunfondis unu el la plej gravaj eldonejoj de Esperantaj libroj. Li verkis sub la pseŭdonimo D. Spero.

Isaj Dratwer

PRI INTERNACIA LINGVO dum jarcentoj (DUA ELDONO)

Necesa por ĉiu serioza esperantisto. Entute 360 paĝoj. En la indekso 757 nomoj. Prezo: 30,00 ned. guldenoj plus 10% sendokostoj.

Mendojn akceptas la sola distribuanto: la Libroservo de UEA. La reven-distoj havas la kutiman rabaton.

C. Universitata profesoro pri matematiko elpensis la internacian decimalan monsystemon "spesmilo" en 1907. Li estis prezidanto de Svisa Esperanto-Societo kaj la ĉefredaktoro de *Internacia scienca revuo*.

Ĉ. Luterana pastro fariĝis la unua prezidanto de Svisa Esperanto-Societo en 1902 kaj estis kunprezidanto de la 2a Universala Kongreso, okazinta en Ĝenevo en 1906. Li estis pioniro de la stenografia uzo de Esperanto.

D. Ĝeneva psikologo kaj pedagogo, direktoro de la Instituto Jean-Jacques Rousseau, aktivis en la svislanda Esperanto-movado inter la du mondmilitoj kaj estis membro de Universala Esperanto-Asocio. Lia plej grava verko pri Esperanto estas *Enketo pri internacia helplingvo* (1948).

E. Juna svislandano, lerninte Esperanton en Ĝenevo en 1903, fariĝis la dua redaktoro de la revuo *Esperanto*, kiun li transprenis de la fondinto, Paul Berthelot, en 1907. Li signis siajn artikolojn per la inicialoj A.R.

F. Ĝenevano, kiu lernis Esperanton kune kun (E) okupiĝis, inter aliaj aferoj, pri la apliko de Esperanto en la telegrafio, radio-telegrafio kaj radiofonio. En 1922 li helpis aranĝi interŝtatan konferencon pri lerneja instruado de Esperanto sub la aŭspicioj de la Internacia Oficejo pri Edukado, kies direktoro estis (D).

G. Juristo, kiu en 1909 aliĝis al Universala Esperanto-Asocio, fondita de (E) en 1908, okupis plurajn oficojn en tiu organizaĵo; en la periodoj 1920-1924 kaj 1928-1934 li estis prezidanto de la Asocio. Li verkis biografion pri (E).

Ĝ. Svislanda civitano, kiu naskiĝis en Germanio, oficis kiel direktoro de Universala Esperanto-Asocio de 1924 ĝis 1946. Sub la pseŭdonimo Georg Agricola li verkis serion de primovadaj artikoloj, titolitan "Esperantistaj problemoj".

H. Romanĉa lingvisto ĉefredaktis *Svisa antologio*, eldonitan en 1939 de Literatura Mondo. Ekde 1947 li prizorgas la Esperanto-elsendojn de la Svisa Kurtonda Radio.

hejmo, lernejo, ludoj. Formatoj: A4 aŭ A3. Ĉiu infano ricevos memoronaceton. Sendu al Esperanto-Societo de Oulu, Valtatie 6-8 B 15, SF-90500 Oulu 50, Finnlando.

La Ottawa Esperanto-Rondo petas bildkartojn, turistliteraturon, Esperanto-revuojn, poŝtmarkojn ktp. el ĉiuj landoj por publika Esperanto-informada ekspozicio okazonta en septembro. Bonvolu adresi: s-ro Ron Ogram, 100 Crerar av-o, Ottawa, Kanado K1Z 7P2.

Por Esperanto-ekspozicio en liceo, junio 1979, skribu al: Sophie Darne, Esperanto-grupo, C.E.C. Jules Val-lès, F-42150 La Ricamarie, Francio.

Mi serĉas — cele ilin aĉeti — la jenajn librojn: *La Dia Komedio*, *Kon-Tiki*. Ofertoj petataj al: Rud. Kratzmann, Karl-Schmidbauer Str. 5, D-8399 Griesbach im Rottal, FR Germanio.

Pasigu feriajn semajnojn aŭ jarojn ĉe Esperantista familio en germanlingva etagrikultura komunumo. Se vi estas nefumanto petu prospekton kun fotoj de: Eichholz, Landheim deutscher Kultur, Bailieboro, Ontario, Kanado.

Por infana lernolibro (10-13j) mi serĉas rakontojn pri homoj, kiuj atingis ion por la homaro, ekz. reĝo Aŝoka, Dunant, Koch. Vilma Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj: Alfred Mayer, Zeppelinstr. 35, D-7500 Karlsruhe 21, FR Germanio.

Volonte estiĝus pastro romkatolika, egale kie. Episkopo serĉata, povanta pardoni mian mallongan neeklezian geedzecon. Propagandu nacilingve. Beleznaï, Postbus 2568, Heerlen, Nederlando.

LA TORNISTRO — bona distro — 8 numeroj, kompleta kolekto de diversstemaj legaĵoj, 270 paĝoj, 22cm., bindita: 22 gld., nebindita: 19 gld. Mendu ĝin ĉe UEA.

Pri naturo, muziko, vojaĝoj kaj ĉiutaga vivo deziras korespondi vigla, sincera svedino, 55-jara. Mi kolektas nur bonajn amikojn, nenion alian! Respondu al: Anne-Marie Lundqvist, Dalviksringen 2, S-552 60 Jönköping, Svedio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

LEONOJ. UEA starigas novan kunlaboron kun Leonaj Klubo Inter-naciaj kaj petas, ke Esperanto-parolantaj anoj de tiu internacia serva organizaĵo anoncu sin al nia Centra Oficejo. Dankon!

Naturistoj/nudistoj, ankaŭ en netranspagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn kaj aliĝilon ĉe H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germ.

Geinstruistoj kaj gepatroj, instigu viajn gelernantojn kaj gefilojn, 5-15-jarajn, partopreni konkurson okaze de Internacia Jaro de la Infano. Ili faru desegnaĵojn, akvarelojn k.s., po 1-3 bildoj; grandeco maksimume 40x35 cm. Temo: "Kion mi mem esperas kaj kore deziras al ĉiu infano en la mondo". Ĉiu partoprenanta infano ricevos diplomon de Sveda UNICEF-komitato, kiu publike ekspozicios la

bildojn en svedaj urboj. Krome premioj por la plej bonaj laboraĵoj. Skribu nomon, aĝon, sekson kaj adreson dorsflanke de la bildoj. Sendu baldaŭ (sed eblas ankoraŭ ĝis la fino de junio). Adresu al la organ-izanto: INTER-grupo, Pf. 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.


Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.

Bildlibrojn por infanoj deziras interŝanĝi Esperanto-Rondo en Ikeda. Kontakto kun f-ino Hayasi Sigemi, Satukigaoka 3-3-30-303, Ikeda-si, 563 Japanio.

Disleksio — legastenio estas la temo de doktora tezo, kiun mi redaktas. Mi deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĝi. André Bertin, 6 Champs Blancs, F-91330 Yerres.

Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj komence de septembro. Limdato por alsendado 79 06 30. Aĝolimo 14 jaroj. Temoj: internacia amikeco,

Praktika Bildvortaro de Esperanto



PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO
Eldonis: Oxford University Press, 1979.
96p. 23cm. ISBN 0 19 431236 4. Plastumita kovrilo. 2000 vortoj en Esperanto, ilustritaj per koloraj bildoj.

Ĉefa distribuanto: **LANGUAGE SERVICES**
17 High Street,
St. Peter's, Broadstairs,
Kent, Anglujo.

Por ricevi ekzempleron per revenanta poŝto, ĝiru egalvaloron de 10 guldenoj al Brita Poŝtĉekkonto 392 6257 aŭ sendu ekvivalentan sumon en bankbiletoj (okcidenteŭropa valuto aŭ dolaroj). Por flugpoŝto ekster Eŭropo aldonu: 2 guldenojn por la Amerikoj, 3 guldenojn por la For-Oriento; por registrita poŝto aldonu 2,95 guldenojn.

Mendebla ankŭ ĉe la Libroservo de UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Praktika Bildvortaro de Esperanto

Savu nin per starigo de la SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!


♦ Esp/1
Elirpaŝo: Malsovaĝigi la Politikon mem — per SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO. Tio signifas fari gravan antaŭpaŝon

al politika aktiveco. Tio signifas konduki la Politikon for de ties miljaraj primitivaj bazoj de kreteco kaj sovaĝeco, kiuj ĝis nun mastris en ĝi. Tio signifas meti la Politikon sur la relojn de

- vereco scienca (nur; iluzioj for!)
- saĝa racieco
- superdemokrata respondeco.

Tiu grava paŝo decida blokos efektive la aktualan idiotan kuron de la Homaro al memekstermo.

ORIENTIGA NOTO: La supra anonco estas la unua en serio, kiu sekvas la alvokon "Alarmo", aperintan sur la lasta kovrila paĝo de ĉi tiu revuo en marto 1979. La sigloj (mallongigoj) komence de la anoncotekstoj (vidu ĉi-supre ekz. **Esp/1**; sekvas poste **Esp/2**, **Esp/3** ktp) servas por fine povi kunmeti la normaron de la M/I.



MONDHARMONIKA INSTITUTO
Via Sport 18, 40065 Pianoro, Italio

1979 -- Datreveno de la Deklaracio de

HOMAJ RAJTOJ



Jaro pri la

INFANO

Pri tiuj temoj:

„PRELEGOJ

DISKUTOJ..

en gresillon

de la 2a de julio ĝis la 21a de julio

por informoj kaj aliĝoj:

skribu al:
ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon, F-49150 BAUGÉ, Francio



Swissair portas
la mondon
al Svislando
kaj Svislandon
al la mondo.

Oficiala flugkompanio de la 64a UK

